

Monato


INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

TURISMO

Malkovru Malion

Suka kollu

La kvara parto
de nia serio



**Rekordo
per balono**

ESPERANTO SEN MITOJ

**Mensogoj kaj memtrompoj
en la esperanto-informado**

Ziko Marcus Sikosek

Jen dokumento, kiun ni jam delonge bezonis en Esperantio. Laŭ mi, ĝi meritas multe pli vastan diskonigon. *Ivo Durwael, eksa UEA-estrarano pri informado*

Vi ne lasu vin senkuraĝigi: ekzistas ne malmultaj, kiuj trovas vian laboron nenecesa kaj kiuj volas daŭrigi la danĝeran primitivan argumentadon. Mi forte aprezas vian sobrecon kaj materialbazon. *Detlev Blanke, prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik*

Bonege prilaborita verko! Nepra por ĉiuj kiuj volas scii pli kaj honeste informadi pri Esperanto. *Miquel Gómez i Besòs, TEJO-estrarano*

Paĝoj: 312; 21 cm; glue bindita; 1999. ISBN 90 71205 77 3.

Ziko Marcus Sikosek

**ESPERANTO
SEN MITOJ**

MENSOGOJ KAJ MEMTROMPOJ
EN LA ESPERANTO-INFORMADO

Prezo: 24,00 EUR

Anna Löwenstein



LA ŜTONA URBO

Anna Löwenstein

Ampleksa historia romano. Juna keltino en la unua jarcento de nia epoko estas portita al Romo kiel sklavo. *La Ŝtona Urbo* esploras ŝian penan lukton por adaptiĝi al la vivo en pli "progresinta" socio - kvankam, kiel oni malkovros, la kelta civilizacio ne estis tiel primitiva, kiel oni nuntempe emas supozi. En Romo ŝi ekkonas la fruajn kristanojn, kiuj estas ne sanktuloj sed aktivuloj en nova movado ofte dividita pro kvereloj kaj polemikoj.

La rigore kontrolita lingvoprovizo de la romano konsistas nur el fundamentaj kaj oficialaj radikoj.

Paĝoj: 356; 21 cm; glue bindita; 1999.
Serio Stafeto, n-ro 23; ISBN 90 71205 77 0.

Prezo: 24,00 EUR


KONTO DE L' VIVO

Paul Gubbins

Kolekto de kvar teatraĵoj, du el kiuj akiris resp. la unuan kaj duan premion en la Belartaj Konkursoj. Ingrediencoj de la enhavo estas starpunktoj pri sociaj temoj kaj spritaĵoj.

Paul Gubbins estas konata i.a. kiel scenaristo de la vidbenda kurso *Pasporto al la tuta mondo*, redaktoro de la magazino *Monato*, premiito en la Belartaj Konkursoj kaj aktivulo de ILEI. En la pedagogia kampo li cetere jam diskonigis sian nomon, i.a. instruante en la somerlernejo en Barlaston, Britio kaj aliloke, kaj verkante lernolibrojn *Kunvojaĝu* kaj *Subtekste* (aro da lecionoj de la Somerlerneja Kurso en Barlaston).

Paĝoj: 140; 21 cm; kudre bindita; 1999.
Serio Stafeto, n-ro 22; ISBN 90 71205 76 2.



Prezo: 13,50 EUR

Monato

20a jarkolekto, n-ro 6

junio 1999

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 20a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo)

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be; TTT: http://www.esperanto.be/monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: maul@newsfactory.net

Redaktoroj: Gerrit Berveling (Spirita Vivo), Harri Laine (Scienco), Evgeni Georgiev (Hobio, Turismo), Edmund Grimley Evans (komputado), Paul Gubbins (Politiko, Moderna Vivo), Boris Kolker (Libroj), Geraldo Mattos (Novelo, Poezio), Stefan Maul (El mia Vidpunkto, Ŝerco & Satiro), Roland Rotsaert (Ekonomio), Claude Rouget (Medio), Guido Van Damme (Leteroj), J.-P. VandenDaele (Enigmoj), Yamasaki Seikō (Lingvo), vakas arto.

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts.

Reviziantoj: Renato Corsetti, Ian Fantom, Edmund Grimley-Evans, Alex Humet, Aleksandro Kogan, Jens S. Larsen, Gonçalo Neves, Izabel C. Oliveira Santiago, Mark Rison, Alexander Shlyaf, Katalin Smidélus. Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Kontrolanto: Izabel C. Oliveira Santiago

Grafiko: Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.



Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen



Estimataj gelegantoj,

el la geamikoj, kiuj dekomence helpis min en redaktado de la revuo, kelkaj intertempe ĉesis – pro diversaj kialoj – kunlabori, sed ankoraŭ vivas. Nun ni funebras pro la forpaso de unu el ili, plej fidela Maria Becker-Meisberger, kiu kolektis kaj elektis kuir-receptojn senditajn de legantoj. Tre zorgeme ŝi plenumis tiun ĉi taskon, elprovante ĉiun recepton antaŭ publikigo, aldonante klarigojn kaj konsilojn pri sano kaj prudenta nutrado. Ŝia edzo Günther estis viktimo de tia testado, sed tiel ĉiumonate povis ĝui minimume unu novan manĝaĵon. Rezulto de ŝia sindonema laborado estis ankaŭ la libro Internacie kuir, eldonita de FEL. Sed nur malmultaj probable scias, ke Maria estis ankaŭ elstara poeto; ŝi verkis poemojn en sia hejma dialekto. Kiu konis ŝin scias, ke Maria estis bonkora kaj ĉiam helpema homo kaj samideano. Sed por MONATO kompreneble gravis precipe, ke la fakinstruistino pri mastrumado kaj kuirarto kompetente redaktis la konceman rubrikon, ĝis antaŭ sep jaroj trafis ŝin grava malsano, kiu grandparte katenis ŝin al la lito. Post longa suferado nun ŝi mortis – grava perdo ne nur por la edzo, kiu dediĉeme flegadis ŝin, sed ankaŭ por ŝiaj multaj geamikoj. Pluraj el ili persone kondolencis al Günther dum digna funebra ceremonio. Mi kondolencas ĉi-loke kaj rajtas fari tion sendube ankaŭ nome de niaj legantoj.

Sincere via, Stefan Maul

Radhadesh Château de Petite Somme

6940 Septon (à 3 km de Durbuy)
tel: 086/32 29 26 tel. et fax: 086/32 35 90



Kastelo Radhadesh: 35 000 vizitantoj jare. (vidu p. 13)

Enhavo

leteroj	4
el mia vidpunkto	5
politiko	6
ekonomio	7
moderna vivo	9
medio	11
spirita vivo	13
komputado	15
serio	16
eseo	18
hobio	20
turismo	21
novelo	23
libroj	27
poezio	29
ŝerco kaj satiro	30

En la venontaj numeroj

Turismo Londono, urbo de mitoj (Will Green)
Novelo Salonvakeroj (Garbhan MacAoidh)
Medio Aĉaj kosmetikaĵoj (Mu Binghua)
Hobio Glisflugado (Evgeni Georgiev)

Kontraŭ milito

Kiam NATO ekbombadis Jugoslavion, komenciĝis milito ne kontraŭ unu homo, sed kontraŭ tuta popolo. Komenci militon estas facile, fini ĝin estas tre malfacile. Ĉu pere de milito povas solviĝi iu problemo? Historio montras, ke ne. Per bombado oni nenion povas pruvi; krome, la problemoj nur kreskos. Por solvi mondajn problemojn kaj gardi pacon kreiĝis post la dua mondmilito Unuiĝintaj Nacioj. Sed ankaŭ ni persone povas kontraŭstari militon kaj krei ĝeneralan, komunan opinion kontraŭ milito. N. LEVITSKIY, Germanio

Nekongrua sed kohera

Aldone al la libroj menciitaj en la artikolo „Nekongruaj klarigoj” (MONATO, 1999/3, p. 5) mi volas menci iu pliajn librojn: Hans-Petr Martin/Haral Schumann, *Die Globalisierungsfalle* (La kaptito de la globaligo) kaj Viviane Forrester, *L'horreur économique* (La ekonomia hororo). Ambaŭ libroj priskribas en tre klara maniero, kien la regado de kapitalismo kaj neoliberalismo kondukas la mondon, helpate eĉ de senpovaj registaroj kaj de la misinformataj, silentaj homamasoj. Cetere, tiuj du libroj flanke tuŝas ankaŭ la artikolon en la sekva paĝo (p. 6) „Sep en unu bato”. La problemoj de t.n. ekonomiaj rifuĝantoj ja ankaŭ estas proble-

mo tutsocia, ne nur belga aŭ eŭropa. Krome ĝi rilatas la artikolon en p. 9 pri Bulgario. La ekonomia stagnado koncernas ne nur Bulgarion. Kaj ke „kresko de produktado” forigos senlaborecon, tion hodiaŭ jam neniu klera homo povas kredi. Pli modernaj maŝinoj tute ne kreas laborlokojn – male, ili detruis ilin. Laŭ opinio de la plimulto el la renomaj ekonomikistoj pli ol du trionoj el la loĝantoj de la tero jam estas „senutilaj” kaj tial „superflujaj” ...

Manfred FÜHRER, Filipinoj

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn kaj glatigi la stilon (= zamenhofal). Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

guido@fel.agoranet.be

Pri politik-arto

Nur parte mi konsentas kun la vidpunkto „Sufero pro sankcio” (MONATO, 1999/2, p. 5). Embargoj pri lakto

trafas nur la popolojn, jes. Oni devus embargi nur armilojn, sed tio ne okazas, kaj ne okazos. Monfeŭdistoj, uzante ŝtatojn (grandajn aŭ ne) kiel peonojn, bezonas diktatorojn, militojn por timegigi kaj stultigi popolojn. Ne, la ŝtatestroj ne montras nekapablon kaj mankon de politik-arto, ĉar ili agas ne por popoloj kaj homa feliĉo, sed por kaŝataj interesoj. Ne ili eraras, sed ni, kredante ke ili kiel gepatroj volas nian feliĉon! Ili nepre devas obei novajn mastrojn, kaj silente, sen tion diri por daŭrigi sian postenon. Jen la vera politik-arto.

Michel MARKO, Francio

Vivo kaj arto

Dankon al Armando Zecchin (MONATO, 1999/3, p. 27) pro lia kortuŝanta konfes-novelo, „La kokino de nia najbarino”. La memoro de la reala vivo ofte diktas la plej bonajn rakontojn.

Josef FLIEGNER, Germanio

Leginda revuo

La vidpunkto (MONATO, 1999/2, p. 5) donas precizan informon al la legantoj. Tiajn soci-politikajn analizojn, kiajn mi povas trovi en MONATO, mi ne trovas en revuoj en Irano. Tial la revuo havas grandan valoron por mi.

Abbas MOMENI, Irano

IDEALA por libroamantoj...



Stafeto
librorondo

Anoj ricevas sesonan rabaton (16,6 %) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de FEL.

Libroj en la serio Stafeto estas altkvalitaj literature kaj prese. Pri la unua gardas W. Auld, la lastan prizorgas la grafika centro de FEL. Jen bonaj kialoj por fariĝi membro de librorondo Stafeto kaj ĝui kelkajn ekskluzivajn avantaĝojn:

- vi ricevos novaperintaĵojn kiel unua, antaŭ ilia surmerkato;
- rabato de 16,6 % ĉe mendo de 1 aŭ 2 ekzempleroj;
- rabato de 40 % mendante minimume 3 samajn titolojn.

Garantio je kontento

Se ial la kvalito de ricevita Stafeto-libro ne plaĉas al vi, vi rajtas resendi ĝin senplie kaj ne bezonas pagi la fakturon. Krome retiriĝi el la rondo eblas ajnmomente: vi simple ricevos la 24,79 eŭroj kiun vi deponis ĉe via membriĝo.

Petu detalajn informojn de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

butiko@fel.agoranet.be

El mia vidpunkto

Senutilaj sindikatoj

Sindikato estas asocio de personoj aŭ societoj por defendi kaj progresigi ekonomiajn komunajn interesojn. De la komenco de la jarcento la sindikatoj estis la ĉefa instrumento de la tiel nomata klasbatalo, t.e. la batalo inter laboristoj kaj mastroj, inter salajruloj, proletoj kaj kapitalistoj, entreprenistoj. En tiu sindikata batalo ĉiuj klopodis por eltiri la maksimumajn avantaĝojn aŭ akordiĝi rilate al la reciproka ekspluatado. Ĝis la 90aj jaroj same la entreprenistoj kiel la salajruloj dependis de tiuj intersindikataj akordiĝoj por pretervivi en la ekonomikaj kaj ekonomiaj ludoj de la produktado. De deko da jaroj okulfrape la sindikatoj fariĝis senutilaj por la klasbatalo.

La kapitalo venkis

En tiu batalo, danke al la teknologia progreso, kiu venigis la aŭtomatajn maŝinojn kaj robotojn, la manlaboro, la laboristoj plejparte ne plu estas bezonataj en la produktado. Tiel la sindikatoj perdis sian efikon. Sindikatisto Jair Mengeguelli el Brazilo, kiu estis feroce agitisto en la 70aj jaroj konfesas: „La tempoj kiam ni havis teruran povon finiĝis”. Antaŭ dek jaroj Jair havis la ridindan povon okazigi 183 strikojn en ĉiu monato. Nun la eksagitistoj, nome de dio, surgenue, petas al la entreprenistoj, ke ili ne maldungu siajn laboristojn, kaj la sindikatoj kunlabore akceptas redukon de salajro je 15 %. Io neimagebla en la eksa konata klasbatalo.

Malbono iĝis bono

La inversiĝo de la valoroj estas klara en la diroj de la mastroj, ekzemple Luís

Adelar Scheuer, vicprezidanto de Mercedes-Benz de Brazilo, rimarkigas: „Pasinteco nia rilatado kun la sindikatoj estis agresa, malbonega. Nuntempe ili eĉ invitas min por la festoj.”

Same sindikatestro Luiz A. de Medeiros konfesas, ke la bono iĝis malbono: „Pasinteco, la laboristoj portis min en siaj brakoj. Nun ili nur atentis pri tio kion mi diras, kiam ni lotumas premiojn en la kunvenoj.”

Notinde estas, ke en Brazilo la kontribuo al sindikatoj estas deviga por ĉiuj. De antaŭ 1950, pro la faŝismaj leĝoj de diktatoro Getúlio Vargas, ĉiu salajrulo devas „donaci”, jare, unu tagon da laboro. Estas facile diveni kiel veraj fortunoj fluas al politikaj manovroj, sinekuroj kaj pliaj negocacoj, nome de sindikatismo, de klasdefendo.

De longe tiuj sindikatoj fariĝis politikaj premgrupoj je la servo ne plu de ĝenerala salajrularo sed de apartaj korporacioj, kiuj eĉ endanĝerigas la tutan stabilecon de la ŝtato, ekzemple la privilegio ĉe la ŝtatoficistoj de Brazilo.

Triobliĝo de produktiveco

La definitiva senutileco de la sindikatoj estas specife konstatabla ĉe la industrio pri aŭtomobiloj laŭ la evoluo de la lastaj 10 jaroj. Eĉ la sindikato de la metalurgiistoj kaj la sindikato de aŭtomobilfabrikantoj prezentas la jenajn konstatojn:

La nombro de laboristoj falis de: 1988 – 113.000 al 1998 – 104.000; la mezuma salajro (en realoj) duobliĝis de: 1988 – 650 al 1998 – 1.400 la produktado de veturiloj ankaŭ duobliĝis

de: 1988 – 920.000 al 1998 – 2.000.000 kaj la produktiveco preskaŭ triobliĝis: 1988 – 8 al 1998 – 20

La produktiveco estas la kvanto de aŭtoj fabrikitaj dum unu jaro fare de ĉiu dungita laboristo, en la koncernaj industrioj.

La multnacia tutmonda Ford, kiu baldaŭ inaŭguros tute novan fabrikon, deklaras, ke ĉiu laboristo produktos ĉiujare 85 aŭtomobilojn! Malpli ol 12 homoj por 1000 veturiloj. Kiu ŝtato aŭ sindikato povos devigi Ford dungi 1000 homojn por malpliigi la senlaborecon?

La ĉi-supraj ciferoj estas aparte elokventaj. La duobligo de la salajroj kiu okazis ĉe la metalurgiistoj estas tute escepta. Ĉe la aliaj salajruloj la reala salajro (laŭ aĉetpovo) reduktiĝis. Se la produktado duobliĝis, ĉu la fabrikistoj demandis al si mem, kiuj povos aĉeti la stokitajn aŭtojn, kiuj akumuligas en la parkejoj? La produktiveco triobliĝis, sed la prezoj tamen ne trioniĝis. Do kien iras la profitego, se ne en la tutmondigitan spekuladon kaj aĉetadon de robotoj?

Geniaj sindikatistoj

Kiel ni scias, la sindikatistoj estas vere geniaj kaj ili ĵus proponis tute faŝisman planon al la registaro por solvi la krizon: la ŝtato promulgu leĝon, laŭ kiu la malnovaj aŭtoj (pli ol dek jaroj) ne plu rajtu cirkuli!


La ŝtato demetu la impostojn, ĉar tiel la vendo-prezo duoniĝos kaj ĉiuj povos aĉeti novan aŭton! Facile, ĉu ne?

Iom realisma, sociologo Leôncio M. Rodrigues opinias, ke tre malfacile, same kiel la dinosaŭroj, la sindikatoj povos definitive malaperi, sed certe ili devos ŝanĝi sian aspekton kaj funkcion: „En la socioj post-industriaj la misioj de la sindikatoj estas nedifinitaj.”

Konklude: la klasbatalo finiĝis kaj la sindikatoj iĝis senutilaj.

Gilbert LEDON

Tradicie en germana aŭtomobil-industrio (la foto montras fabrikon de Mercedes) sindikatoj estas fortaj. Sed eĉ en tiu ĉi sekcio sindikatoj perdas pli kaj pli gravecon – kaj membrojn.



INTERNACIAJ RILATOJ

Suferas senkulpuloj


Brita ĵurnalisto vizitis la funebrantan familion de 25-jaraĝa Fadila Amier post bombado de Bagdado. Bombo eksplodis apud ŝia hejmo kaj – laŭ la ĵurnalisto – „ŝi kuŝis sur la grundo teneganta la stomakon, dum sango verŝiĝis el la abdomeno kaj femuroj.” Ŝi estis graveda. Ŝia fratino diris: „Ni kondukis Fadila al la plej apuda hospitalo, sed oni ne havis rimedojn; oni ne povis operacii.”

La aventuro super Irako estis kontraŭleĝa, kaj Britio estis la sola lando kunlaboranta kun la usonanoj. La rezulto estis la morto de pli ol cent senkulpaj homoj. Tio estas krimo. Oni uzas la eŭfemismon „flanka damaĝo” por priskribi mortojn. Ĉiam la senkulpuloj suferas en ĉi tiuj aferoj. La reputacio de Saddam Husejn estas aĉa, sed la krimo restas.

Besta tirano

La generaloj ne demandis al Fadila, kion ŝi opinias pri Saddam. Certe multaj irakanoj opinias, ke li estas besta tirano, kaj sopiras al lia morto. Sed estis ordinaruloj, kiuj suferis dum la milito en 1991, kaj kiuj ankoraŭ suferas; aparte la Ŝijaanoj kaj la Kurdoj, nepacigeblaj kontraŭuloj de Saddam, konskripciitaj dum la „Golf-milito” kiel facilaj celoj por la usonanoj.

Britoj devas memori, ke la iama ministro Douglas Hurd vizitis Irakon en 1981 por celebri la datrevenon de la venko de Saddam – unu el la plej sangaj okazaĵoj en la historio de Mezoriento. Hurd estis bonega komercisto kaj vizitis ĉefe por vendi armilojn. Se Saddam ne estus ricevinta usonajn kaj



Politikaj opinioj ŝanĝiĝas. Douglas Hurd en 1981 vendis britajn armilojn al nuna „krimulo” Saddam Hussein.

britajn batalilojn, li certe ne estus travivinta la militon en 1991 por retenigi hodiaŭ sian povon.

Teruraj krueleĝaĵoj

Nuna ministro, George Robertson, ankoraŭ vizitas egale monstrajn tiranojn por vendi armilojn – ekzemple la bandon, kiu regas Indonezion. Robertson deziras sendi armilaron al Koptoj, la soldataro, kiu gvidis la invadon de Orienta Timoro, murdis kvin okcidentajn ĵurnalistojn, kaj respondencis pri la plej teruraj krueleĝaĵoj en tiu senleĝe okupita teritorio. Prezidento Suharto kaj poste lia bofilo, generalo Prabowo, regis kun subteno kaj per amiloj de Usono kaj Britio.

Ankaŭ Saddam ŝuldas sian potencon al tiuj du landoj, kiuj ankoraŭ mortigas civilulojn en Irako. Saddam povas pretendi, ke li venkas siajn okcidentajn malamikojn: dume la bombado – forgesita pro la krizo en Kosovo – pli fortigas lian tiranecon kaj li fariĝas eĉ pli populara. W.H. SIMCOCK



Suferas senkulpuloj: jen iraka familio en ŝirmejo en Bagdado.

BRITIO

Etiko sen efiko

La brita registaro – teorie socialisma sed praktike kapitalista – fieras pri sia etika kaj verda politikoj. Ĝi ne permesas – almenaŭ oficiale – ke britaj firmaoj vendu armilojn al registaroj, kiuj uzos la armilojn ne simple por sin defendi. Tamen Britio restas ankoraŭ unu el la plej grandaj fabrikantoj de armiloj en la mondo.

Antaŭ nelonge la ministro pri eksterlandaj aferoj anoncis verdan, medioprotektan politikon. Parolante pri Mez-Oriento, li diris: „Paco en tiu ĉi regiono estus pli certa, se akvostokoj estus efike konservataj.” Li aldonis: „Ni fortigas nian medioprotektan politikon per eksterlanda politiko, kiu subtenas demokration, homajn rajtojn, respondecon kaj malfermecon.”

Tamen kiu nacio subtenas bilion-dolaran projekton por konstrui akvo-barilon llisu trans riveron Tigris en Turkio? Memevidente Britio, ĉar brita kompanio anoncis sian intereson konstrui la barilon, kio liveros grandiozajn profitojn. Se ĉiuj financaj aranĝoj estos akceptitaj, la kompanio eklaboros antaŭ la fino de la jaro.

Sentiva regiono

La Monda Banko, parenteze, jam rifuzis financi la barilon planatan en politike tre sentiva regiono. Nur 70 km for troviĝas la landlimo kun Sirio kaj Irako kaj, pere de la barilo, Turkio povus regi akvo-provizon en ambaŭ landoj. Plue, la barilo situus meze de kurda regiono. Reaĵo de la konstru-projekto signifus la subakvigon de 52 vilaĝoj kaj 15 urboj, inkluzive de la mezepoka komunumo Hasankeyf, kun 5500 loĝantoj, ekde 1978 „protektata” de la turka registaro pro la historia kaj kultura graveco.

Forte protestis membroj de la brita medioprotekta asocio *Amikoj de l' Tero*, kiuj atentigis, ke financa subteno por la barilo – la brita registaro pretas kovri kvinonon de la tuta kosto – primokas etikan kaj verdan politikon. Laŭ parolisto de la asocio: „Ni haltigu tiun ĉi projekton, antaŭ ol la brita registaro estigos militon en Mez-Oriento, detruos parton de la kurda patrujo, kaj vaste difektos la medion.”

Paul GUBBINS

NAFTO

La nafto-interesoj de LUKoil en Balkanio

Lastatempe la plej granda rusia privata naftokompanio LUKoil manifestas grandan aktivecon en sud-orienta Eŭropo. Krom al Bulgario kaj Rumanio la kompanio direktas sian atenton ankaŭ al Grekio, Montenegro kaj estont-ece eĉ al la landoj de norda Afriko. Kiel oni povas klarigi la intensigitan interesiĝon de LUKoil al ŝtatoj, kiuj ne estas inter la gvidaj sur la monda naftomerkato?

La kaŭzo estas simpla: krom ke LUKoil daŭrigas siajn strategiajn eksport-interesojn, ĝi ne povas prilabori la tutan kvanton de nafto kiun ĝi akiris en Rusio. Dum 1998 oni akiris 64,2 milionojn da tunoj de la „nigra oro“, el kiuj 25,6 milionoj estis eksportitaj kaj 21,1 milionoj estis transportitaj al la rusiaj naftoprilaboraj entreprenoj en Perm, Volgograd kaj Niĵnij Novgorod, samkiel al la rumana kompanio Petrotel. Pro la manko de prilaboraj produktopovo LUKoil malsukcesis prilabori la restantaj proksimume 17 milionojn en siaj entreprenoj en Rusio. Do estis lanĉita la ideo pri prilaboro kaj posta vendo de la restanta nafto en eksterlando. Nome pro tio la estraro de LUKoil strebas disvastigi sian influon sur la ĉiam ankoraŭ „virgan“ Balkanion. La pasintan jaron la rusia kompanio sukcesis akiri 51 procentojn de la akcioj de rumana Petrotel, kies volumeno de naftoprilaboro atingas 4,7 milionojn da tunoj jare. Oni supozas, ke la tuta spektro de la naftoproduktaĵoj tie estos distribuata en Rumanio kaj en ties najbaraj landoj.

Fine de februaro ĉi-jare estis subskribita deklaro pri kunlaboro de LUKoil kun la greka nacia naftokompanio Hellenic Petroleum, kiu antaŭvidas la fondon de kuna entrepreno por produktado kaj vendo de naftoproduktaĵoj en Grekio kaj la ceteraj balkanaj landoj. Hellenic Petroleum produktas 56 procentojn de tiu branĉo en sia lando (9,3 milionojn da tunoj jare) kaj posedas 1100 benzinstaciojn, kies nombro povus pliiĝi ĝis 1600. La spezo de la greka kompanio dum 1998 sumiĝis je 2,5 miliardoj da usonaj dolaroj. Tio ebligas LUKoil organizi la produktadon kaj vendon de siaj naftoproduktaĵoj en Greklando pere de la lokaj benzinstacioj. Krome, la rusia kompanio pritraktas la grekan merkaton kiel eron de sia estonta strategia ĉeno de ekspansio al la merkatoj de norda Afriko kaj – verŝajne – ankaŭ al Irako.

LUKoil penetris en Jugoslavion. La kompanio jam aĉetis kelkajn benzinstaciojn en Montenegro kaj ĉiam pli aktive estas esplorataj la eblecoj por kunlaboro kun la loka monopola firmao Jugopetrol-Kotor. En najbara Kroatio fine de 1998 estis subskribita kontrakto kun loka kompanio INA Industrija Nafta pri la fonda de kuna entrepreno LUK-INA por reeksporto de nafto al aliaj landoj, ekspluato de naftotrovejoj, prilaboro kaj vendo de nafto. Estas supozate, ke tiu nova entrepreno funkcios ankaŭ en la rusiaj trovejoj, kiuj estas proprieto de LUKoil, kaj eble plivastigos sian agadon en vico de aliaj ŝtatoj kiel Egiptio, Sirio, Libio kaj Indonezio.

Bulgario estas la sola lando en la regiono, en kiu la rusia kompanio malsukcesis ricevi kontrolon super la loka merkato. Al LUKoil-Petrol, filio de LUKoil en Bulgario, estis rifuzite partopreni en la privatigo de 51 procentoj de la akcioj de bulgara ŝtata kompanio Petrol AD, kiu posedas trionon de la bulgara merkato. Intertempe tamen Agentejo pri Privatigo en Bulgario decidis ŝanĝi la kondiĉojn por partopreno en la aŭkcio, pliiĝante la sumojn


de kaŭcio de la partoprenantaj firmaoj kaj postulante de ili bankgarantiaĵojn. Do la privatigo de Petrol AD ripetigos.

Ĉiam ankoraŭ oni ne scias kiel la nuna politika situacio en Balkanio efikos sur la rusiajn naftonegocojn en tiu regiono. La milito en Jugoslavio pere de apliko de bombaj aeratakoj eble kaŭzos perdojn al LUKoil. La situacio certe komplikiĝos ankaŭ pro la fakto, ke granda parto de gajnoj de LUKoil rezultas el vendo de benzino pere de benzinstacioj. Evgeni GEORGIEV

Banka konkurenco

Ekde la 1a de januaro 1999 dek unu membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio reciproke fiksas la kurzojn de siaj valutoj. Tio estis paŝo en la enkonduko de la nova komuna valuto, la eŭro (ISO-kodo: EUR). Dum la unuaj jaroj la eŭro ekzistos nur ĝire; ĝiaj bankbiletoj kaj moneroj post kelkaj jaroj anstataŭos la nunajn.

Ĉar la kurzoj en eŭroregiono estas fiksitaj, la bankoj ne plu havas kurz-riscon aĉetante kaj vendante ties valutojn. Por devigi la komercajn bankojn limigi la ŝanĝkostojn, la centraj bankoj mem senkoste kaj je fiksita kurzo ŝanĝos monon por privatuloj. Tio tamen okazos etskale: nur en la ĉefaj filioj de la centraj bankoj, nur de eŭrolandaj valutoj al la loka valuto, kaj nur por biletoj, ne moneroj. RR



Tutmondigo – por la grandaj industriaj kaj komercaj kompanioj nenio nova. Ili aktivis jam de multaj jaroj en multaj landoj kaj kontinentoj. Jen do listo de multnaciaj kompanioj kun plej grandaj eksterlandaj posedaĵoj (investoj, filioj ktp.) laŭ statistiko de Konferenco de UN pri Komerco kaj Evoluigo (KUNKE).

Malpli da ekonomia kresko en 1998

En studo de la Viena Instituto por Internaciaj Ekonomiaj Komparoj, oni konkludis ke la konjunkturo en la iamaj planekonomiaj landoj de Mez- kaj Orient-Eŭropo malboniĝis preskaŭ ĉie dum la pasinta jaro. Tio kompreneble ne signifas, ke la eniro de tiuj landoj en Eŭropan Union (EU) estos prokrastita.

En la kvin plej progresintaj landoj de la regiono – Hungario, Pollando, Ĉeĥa Respubliko, Slovenio kaj Slovakio – dum 1999 la malneta enlanda produktaĵo (MEP) devus pliiĝi je 3 %, post kiam ĝi estis 3,2 % en 1998 kaj 4,9 % en 1997. Ankaŭ dum la jaro 2000 la ekonomia pliiĝo devus sumiĝi je ĉirkaŭ 3 %. Laŭ Josef Poeschl, aŭtoro de la studo, respondeca faktoro por la pli malgranda pliiĝo en 1998 en tiuj landoj estas la pli signifa malpliĝo en Pollando de 6,8 al 4,8 %, samkiel la recesio je 2,6 % en la Ĉeĥa Respubliko.

Ne tre rozkolora estas pritaksita la situacio en Rumanio kaj Bulgario. Bulgario ja havas por la tuta 1998 pluson en la MEP de 4 %. Malgraŭ la altega pliiĝo de 19 % en la unua kvaronjaro, tamen proksime al la jarfino de 1998 la lando eniris recesion. Ĉi-jare la bulgara ekonomio devus pliiĝi je 0,5 %. La MEP de Rumanio ree malpliĝos. Tiu malgrandiĝo je 4 % tamen estos malpli granda ol dum la antaŭaj jaroj (-6,6 % en 1997; -5,5 % en 1998).

La ekonomia rezulto de Rusio devus ĉi-jare malgrandiĝi je 3 % (en 1998: -4,6 %), kaj konservos tiun nivelon ankaŭ dum la venonta jaro. En Ukrainio la recesio devus vastiĝi, kaj tie por 1999 estas prognozata malgrandiĝo de MEP je 2,5 % (1998: -1,7 %).

Laŭ ekspertoj de la viena instituto, prokrasto en la alcelata eniro en la Eŭropan Union por la plej evoluintaj landoj ne okazos. Krome evidentiĝis, ke la esperoj je tre baldaŭa eniro ne estis motivitaj. Konkretajn fiksdatojn la ekspertoj ne volis mencii. La decido ja estos prenita sur politika nivelo.

La ekonomia malpliĝo dum la pasinta jaro, laŭ vidpunkto de la viena instituto, povas esti klarigita per malboniĝo de internacia konjunkturo, samkiel per la tendenco al revalorigo de iuj valutoj de la landoj transirantaj al merkatekonomio, kaj per la altaj realaj interezoj. Dum 1998 ili estis averaĝe super la antaŭjara nivelo, ĉar malgraŭ la malpli alta prezaltiĝo la interezoj ne malgrandiĝis.

Krom tio alia kaŭzo por la malfacilaĵoj estas tamen la fakto, ke granda parto de la produktaĵoj en la mez- kaj orienteŭropaj landoj, escepte de Hungario kaj Pollando, fakte estas nesolventaj. Ili estas „nutrataj” per bankkreditoj, kio ŝarĝas la moninstitutojn kaj akriĝas la financan krizon. Ankaŭ la restrukturigo de la produktaĵoj en direkto de modernigo kaj okcidentaj mastrumad-metodoj malfruiĝas, substreki Poeschl.

Laŭ la ekspertoj de la instituto nun maturaj por eniro en la Eŭropan Union estas Hungario, Pollando kaj Slovenio. Evgeni GEORGIEV

PROGNOZO

Ĉu Ĉinio superos Usonon?

Freŝa esplora raporto de la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo montras, ke post 20 jaroj Ĉinio povos anstataŭi Usonon kiel la plej granda ekonomia potenco en la mondo.

Laŭ la raporto, ĝis la jaro 2015 la malneta nacia produkto (MNP) de Ĉinio atingos 9 410 miliardojn da usonaj dolaroj (USD) kaj jam superos la usonan (9 340 miliardojn da USD). Tiam ne nur pri loĝantaro sed ankaŭ pri MNP, Ĉinio sendube estos la plej grava lando de la mondo.

La organizaĵo aplikis propran metodon de kalkulado, neniam uzitan en Ĉinio. Laŭ konservemaj kreskoj je 5,5 % por MNP kaj 4,5 % por pokapa enspezo, la kalkuloj montras, ke en 2015 Ĉinio realigos ĉ. 17 % de la tutmonda MNP.

Mu Binghua

VJETNAMIO

Foiro de bonkvalitaj varoj

Je la 16a de aprilo 1999 matene, la dua foiro de vjetnamaj bonkvalitaj varoj okazis en Amikeca kaj Kultura Palaco de Hanojo. En ĉi tiu ceremonio la prezidanto de la Hanoja Popola Komitato, Hoang Van Nghien, diris: „Vi devas kompreni, ke la prezento kaj disvastigo de vjetnamaj varoj estas maniero de patriotisma esprimo de vjetnama popolo”. En la foiro estis 106 enlandaj firmaoj, elektitaj de konsumantoj.

Vespere la vjetnama Industria Komerca Buroo, Hanoja Popola Komitato

kaj Ministrejo pri Komerco estris diskuton pri la temo *Kiel disvastigi vjetnamajn eksportvarojn?*. Komercaj delegitoj de Usono, Aŭstralio kaj Eŭropa Unio interŝanĝis ideojn kun vjetnamaj firmaoj pri eksporto kaj kvalitozorgo por plialtigi vjetnamajn eksportenspezojn.

NGUYEN Manh Linh

SOCIALLABORANTOJ

Interŝanĝo translime

La franca sociallaboristo Yves Nicolas el Hérouville Saint Clair (Malalta Normandio) dum la somero 1998, okaze de la UK de Montpellier, aliĝis al ASLE (Asocio de Sociallaborantoj Esperantistaj). Ĉar en diversaj landoj sociaj sistemoj tute malsimilas, utilas kolekti informojn kaj havigi ilin al ASLE, kiu povas distribui ilin internacie.

Kontribuo de Yves Nicolas por informinterŝanĝo aperis jam en marto 1999: 20paĝa dosiero titolita C.A.O. – *SOCIALA ORGANIZAĴO POR SENHEJMULOJ*. La broŝuro informas la eksterlandajn gekolegojn pri la help-sistemoj en Francio, kaj pli precize en Caen, ĉefurbo de la regiono Malalta Normandio.

Kontaktadreso:

Yves Nicolas, 17-37 Quartier du Bois, F-14200 Hérouville Saint Clair, retpoŝto: yvanmi@club-internet.fr

ASLE, Soile Lingman, Västerasgatan 4, S-113 43 Stockholm

Edmond LUDWIG

ĈINIO

Urba aŭtomerkato

La ĉina fako pri aŭtomerkato sciigis, ke de post la jaro 2000 la urbaj familioj jare aĉetos pli ol unu milionon da aŭtoj je prezo de po ĉ. 120 000 juanoj.

Antaŭ nelonge la fako faris enketon ĉe 14 978 familioj de 71 urboj. La rezulto reprezentas la staton de 62,5 milionoj da familioj kun sume 205 milionoj da urbanoj. Laŭ la enketo nun 1,3 % de la urbaj familioj posedas aŭton. En okcidentaj urboj la aŭtposeda proporcio estas la plej alta, sed orienta Ĉinio havas la plej grandan absolutan ciferon. Urbaj familioj posedas 6 ĝis 8 % de la civilaj aŭtoj de la lando.

Ĉi-jare aŭto kostas 110 000 juanojn; tio estas iom multekosta. Oni opinias, ke post du-tri jaroj prezo de 120 000 estos konvena por familioj kun alta enspezo kiuj deziras aĉeti bonkvalitan aŭton.

Mu Binghua

KOMUNIKADO

Ĉu renaskiĝis
la frenezulo?

Kiam mi estis knabo, en la kvindekaj jaroj, mi ofte renkontis strangulon, kiu surstrate, sen ajna videbla kialo, vokis: „Ha lo!” Pro tio ni nomis lin Ha Lo. Laŭ mia patro, Ha Lo denaske estis normala homo. Sed en 1945, fine de la dua mondomilito, ankaŭ la vienaj loĝkvartaloj estis trafataj de bomboj, kaj Ha Lo, kaŝinte sin en kelo, estis superŝutita de disfalanta domo.

Li ne estis grave vundita, sed devis kelkajn tagojn atendi, ĝis oni lin elfosis. Dum tiu tempo li ofte vokis por helpo kaj eble tial freneziĝis. Ha Lo de longe mortis, kaj mi forgesis lin. Sed pasintjare, surstrate, mi denove aŭdis tiun „Ha lo!”



Iom for staris viro tute sola, ripetante „Ha lo, ha lo”. Ĉu la frenezulo resurektis? Tute ne. Temis pri poŝtelefono. Kaj do sur stratoj, en metrotrajnoj kaj aŭtoj, en oficejoj kaj domoj, ĉie aŭdeblas „Ha lo!” Ĉu milfoje renaskiĝis la frenezulo? Decidu vi mem!

Walter KLAG

Tigro sen kaĝo

Konsterna kromefiko de la aktuala prospera konjunkturo de la irlanda ekonomio (t.n. „kelta tigro”) estas tio, ke la prezoj de domoj tiom altiĝis, ke ordinara homoj apenaŭ povas aĉeti propran hejmon. Eĉ tiuj, kiuj perlaboras sufiĉe altan salajron – ekz. 30 mil irlandajn pundojn jare – ne kapablas havigi al si domon. En Irlando, kie lueblaj loĝejoj malabundas kaj ofte eĉ ne troveblas, ĉiuj ambicias posedi domon. Por multaj tio ne plu eblas.

IRL



Grandegan piramidon el 20 000 ovoj konstruis entuziasmoj dum la paskaj ferioj en parko en la litova ĉefurbo Vilnius. Oni komencis konstrui la piramidon je la 5a matene, kaj la laboro daŭris ĝis la tagmezo. En la piramido – 5 m larĝa, 4,5 m alta – estis truo, por ke oni eniru kaj vizitu aŭguriston. Apud la piramido oni organizis ludojn, dum muzikis folkloraj grupoj. Post Pasko oni disdonis la ovojn inter maljunulaj kaj virinaj organizaĵoj. La piramido meritis mencioni en „Libro de Litovaj Rekordoj”.

LAST

EŬROPO

Paralizita polico

Belgaj policanoj, kiuj per siaj aŭtoj kun hurlantaj sirenoj kaj bluaj lampoj ĉassekvas krimulojn, rajtas sekvi tiujn ankaŭ, se ili trapasas landlimon. Jen por la polico de malgranda lando kiel Belgio granda avantaĝo.

La internacia interkonsento tamen preskribas „sekvi” sed ne „aresti”: tion

devas fari lokaj policanoj. Tio regule okazas sur germana, nederlanda kaj luksemburga teritorio. Belgaj policanoj radie kontaktas siajn najbarlandajn kolegojn, poste tiuj kune sekvas la krimulojn kaj, se ili sukcesas, arestas.

Tamen ne tiel funkcias, se krimulo trapasas la belgan-francan landlimon. Francio ne agnoskis la eŭropan normon pri policaj radioondoj kaj ne estas deeksterlande atingebla. Se belga policaŭto atin-

gas la francan limon, ĝi devas halti ĉe la unua telefonbudo aŭ benzin-ejo. Tie la belga policano devas voki lokajn kolegojn (se entute la belgo havas la ĝustajn monerojn aŭ telefonkartojn) kaj esperi ne aŭdi iun sonbendon: „Polico – ĉiuj lineoj estas okupitaj – bonvolu pacienci.” Poste la belga policano devas klarigi, ke oni ĉassekvas krimulon, reiri al sia aŭtomobilo kaj daŭrigi sian veturadon en almenaŭ teorie unuiĝanta Eŭropo.

pv

Biera barbulo

Litova bierfaristo, la 45jaraĝa Antanas Kontrimas, atingis novan rekordon. Antaŭ televidspektantoj li levis per sia barbo barelon plenan je memfarita biero – entute pli ol 40 kg. Alia



rekordo estis la longeco de la barbo: 32 cm. La bierfaristo diris, ke li havas sian barbon ekde la 20a jaraĝo. Pri bierfarado Antanas Kontrimas okupiĝas dum kvar jaroj. Pasintjare li produktis en sia fabriketo 32 tunojn da biero.

LAST

Ĉu korupta esploro?

„Ĉu vi ofte subaĉetas ŝtatoficiston?” Jen unu el pluraj demandoj, kiuj konsistigis enketon pri korupteco en Litovio. Evidentiĝis, ke nur 4 % de la demanditoj ofte donas ŝmirmonon; 19 % malofte, kaj 73 % neniam.

Samgrade kulpas donanto kaj ricevanto, laŭ 58 % de la demanditoj, dum 41 % kredis, ke pri korupto ĉefe respondecas persona profitemo aŭ deziro, ke oficisto neglektu delikton. Inter la plej grandaj koruptatoj troviĝas laŭ la enketo policistoj, juĝistoj, oficistoj de ŝtataj instancoj, doganistoj kaj – ironie – esplordemandantoj.

LAST

Viajn kontribuojn por la rubriko „moderna vivo” sendu al:

Paul Gubbins
3 Arden Court
Mossley
Congleton, Cheshire
Britio CW12 3JH

Retpoŝto:

100103.3317@compuserve.com



Bizara spektaklo: litovoj festantaj naskiĝdatrevenon de dana reĝino. Tamen tio okazis la 16an de aprilo, kiam danaj soldatoj, vizitante Litovion, festis la 59an datrevenon de sia reĝino Margrethe 2a. En kafejoj oni regalis per dana kafo, kaj vidiĝis surstrate danaj kaj litovaj flagetoj. Notindas, ke Danio estas unu el ses plej grandaj investintoj en Litovio, kie estas registritaj 205 entreprenoj kun dana kapitalo.

LAST



Pasintjare Litovianoj da ekster-600 mil pli ol dum kaj eksterlandaj personoj pasigmenaŭ unu nokton – superis je 1,4 milionoj aŭ 40 % la ciferon de la pasinta jaro. Plejparte – 46 % – oni venis komercele: nur 15 % libertempis.

Vizitas Litovion pli da turistoj ol Latvion aŭ Estonion. Tamen plej grandan profiton el turismo ricevas estonoj. En Litovio ĉiu turisto elspezas meze 247 usonajn dolarojn kaj vizitanto 50 dolarojn. Ankaŭ litovoj pasintjare vojaĝis pli abunde: 3,24 milionoj da litovoj vizitis eksterlandon. Antaŭan jaron tiu ĉi cifero atingis 2,98 milionojn.

LAST

Bonan vojaĝon!

vion vizitis 4,3 milandaj gastoj: t.e. la antaŭa jaro. En turistoj – laŭdifine intaj en Litovio al-

menaŭ unu nokton – superis je 1,4 milionoj aŭ 40 % la ciferon de la pasinta jaro.

Plejparte – 46 % – oni venis komercele: nur 15 % libertempis.

Vizitas Litovion pli da turistoj ol Latvion aŭ Estonion. Tamen plej grandan profiton el turismo ricevas estonoj.

En Litovio ĉiu turisto elspezas meze 247 usonajn dolarojn kaj vizitanto 50 dolarojn.

Ankaŭ litovoj pasintjare vojaĝis pli abunde: 3,24 milionoj da litovoj vizitis eksterlandon.

Antaŭan jaron tiu ĉi cifero atingis 2,98 milionojn.

ATOMENERGIO

Okcidenteŭropaj sekurecnormoj bezonataj

El la dek mez- kaj orient-eŭropaj landoj kandidatantaj eniri la Eŭropan Union (EU), sep kalkulas por ilia energiprovizo je atomenergio. El la landoj de unua etapo de eniro al EU, Ĉeĥio, Slovenio kaj Hungario disponas pri atomelektrejoj, kaj el la landoj de dua etapo estas Bulgario, Litovio, Rumanio kaj Slovakio.

Entute 24 reaktoroj estas ĉi-momente en ekspluato laŭ indikoj de la mediprotekta organizaĵo Global 2000, kaj 6 reaktoroj troviĝas en konstruado. Ĉeĥio ekspluatas en Dukovany [dukovani] 4 sovetiajn reaktorojn, kaj en Temelin estas 2 sovetiaj reaktoroj en konstruado. En Slovakio funkcias en Bohunice 4 sovetiaj reaktoroj, kaj en Mohovce estas nur unu el 4 reaktoroj en ekspluato. Hungario ekspluatas en Paks 4 sovetiajn reaktorojn por produktado de atomenergio, kaj Slovenio en Krsko uzas okcidentan reaktoron de tipo „Westinghouse PWR-640”.

Bulgario havas en la atomelektrejo Kozloduj 6 reaktorojn de sovetia tipo, kiuj produktas atomelektron, Rumanio ekspluatas en Ĉernavoda okcidentan reaktoron, kaj alia reaktoro estas konstruata. Litovio kalkulas en sia atomelektrejo en Ignalina je du sovetiaj reaktoroj de Ĉernobil-tipo.

Eŭropa Unio postulas okcidentajn normojn por la atomelektrejoj en la landoj kandidatantaj eniri ĝin. La nuklea sekureco devas esti plibonigita por atingi la nivelon konforman al la stato en EU rilate teknologion kaj instrukciojn samkiel en funkcia rilato. Koncerna decido pri tio estis akceptita en kunsido de Eŭropa Unio. Pro la fakto, ke ne ekzistas komunaj-rajtoj de EU en la sfero de nuklea sekureco, oni atribuas al tiu decido grandan signifon dum la konkretaj intertraktoj pri eniro al EU.

Global 2000 pritaksas la decidon kiel agnoskon de EU pri la sekurecnormoj de atomelektrejoj. Ĉi-kune la „stato de tekniko” signifas la lastan, plej modernan nivelon de ĉiuj sekurec aranĝoj. Laŭ indikoj de la mediprotekta organizaĵo en ĉiuj orienteŭropaj atomelektrejoj mankas la protekta kovraĵo de la reaktorpreama konservujo, escepte de la eletrejo en Temelin, kie la kovraĵo estas en malpliigitaj dimensioj.

Ankaŭ rilate la tertreman sekurecon kaj kvaliton de aplikataj materialoj kuŝas la plejmulto de orienteŭropaj atomelektrejoj sub la okcidentaj nor-

moj, komunikis Global 2000. Krome la reaktorpreama konservujo de reaktoro 1 en Mohovce ne konformas eĉ al la rusaj instrukcioj.

EU jam postulis baldaŭan fermon de la malsekuraj atomelektrejoj en Slovakio, Bulgario kaj Litovio kiel parton de la enirpreparoj de tiuj tri landoj. Temas pri la atomelektrejoj en Bohunice (Slovakio), Kozloduj (Bulgario) kaj Ignalina (Litovio). La Komisiono de Eŭropa Unio volas disponigi monrimedojn enkadre de helpa programo *Phare* por mildigi la socialajn sekvojn kaj subteni la landojn ĉe la evoluigo de alternativaj energifontoj, same kiel ĉe la malfunkciigo de reaktoroj.

Fakuloj de EU opinias, ke por la adapto de atomelektrejoj de la mez-kaj orient-eŭropaj landoj kandidatantaj por aliĝo al la Unio necesas 120 miliardoj da eŭroj. Parton de tiu sumo EU promesis disponigi.

Entute el la dek unu landoj nun kandidatantaj eniri Eŭropan Union nur Kipro, Estonio, Pollando kaj Litovio rezignas uzi atomelektrejojn. La ĉapitro „Atomenergio” devus esti pritraktata laŭ indikoj de diplomaciaj rondoj en Bruselo apenaŭ en la finfazo de intertraktoj de EU kun la landoj kandidatantaj.

Evgeni GEORGIEV

EŬROPO

Du el tri arboj malsanas

Tiu malĝojiga statistiko sekvas el aktuala raporto pri la stato de arboj en Eŭropo, kiun prezentis la Komisarejo de la Eŭropa Unio (EU) en Bruselo.

En la EU-landoj kaj en 15 mez-kaj orient-eŭropaj landoj, laŭ la EU-raporto, 25,3 % de ĉiuj arboj perdis pli ol unu kvaronon de la foliaro. 39,3 % de ĉiuj arboj, kun malpli granda foli-perdo, troviĝas en la tiel nomata „antaŭgarda grado”. Kiel ankoraŭ sanaj estas difinitaj nur 35,1 % de ĉiuj arboj.

Ĝenerale la arbarstato en Eŭropo konsiderinde malboniĝis dum la lastaj dek jaroj – oni mencias en la EU-raporto. La nombro de difektitaj arboj pli ol duobliĝis dum tiu periodo.

Kiel ĉefaj kialoj por la malboniĝo estas prezentitaj aermalpurigo kaj ekstremaj sekcoj. En la unuopaj landoj la evoluo estas tre diferenca. Dum en Italio, Nederlando, Bulgario kaj Ĉeĥio

ĉiam pli da arboj malsaniĝas, ekde la komenco de 90aj jaroj iom pliboniĝis la arbaroj en Germanio, Finnlando, Latvio, Portugalio kaj Pollando.

Plej grandaj estas la arbaramaĝoj en la Ĉeĥio (68,6 % da malsanaj arboj), Bulgario (49,6 %) kaj Pollando (36,6 %). Plej malmulte da malsanaj arboj estas en Aŭstrio (7,1 %) kaj Portugalio (8,3 %). En 1997 en Germanio estis, laŭ la EU-raporto, 19,8 % de ĉiuj arboj mezgrave aŭ grave difektitaj – je 0,5 % malpli ol en la antaŭa jaro.

La plej gravaj pliboniĝoj estis en Ukrainio (je 14,6 % malpli da difektitaj arboj) kaj Luksemburgio (je 7,6 % malpli). Klare malboniĝis la stato de arbaroj en Bulgario (je 10,4 % pli), Francio (je 7,4 % pli) kaj Italio (je 5,9 % pli da difektitaj arboj).

Evgeni GEORGIEV

AŬSTRIO

Bruligo de mastruma rubo

Kien la mastruman rubon? Unue eviti ĝin! La ne-eviteblan rubon laŭspece kolekti kaj re-uzi! Malnova papero iĝas kartono, rubo-metallo fandiĝas kaj puriĝas, same vitro-rubo estas reuzata fare de la industrio. Tamen estas tro da rest-rubo!

En Aŭstrio la deponejoj estas preskaŭ plenaj. Krome ili damaĝas la medion. Elvenas diversaj gasoj, ekzemple metano, kiun oni jam povas parte kolekti kaj bruligi por produkti varmon aŭ elektron. Elfluas venenaj likvaĵoj, kiuj igas la grundakvon netrinkebla. Cetere deponejoj estas multekostaj.

Eblas bruligi la rest-rubon. La plej grandaj rubobruligejoj aŭstriaĵ staras en Vieno. Tiu en Špitelaŭ kaj alia kune „voras” ĉiujare 440 000 tunojn da mastruma rubo kaj produktas varman akvon, kiu estas kondukata en domojn por varmigi ilin en vintro. La varman akvon oni povas ankaŭ uzi en kuirejo kaj banejo. Tiel en Vieno estas bruligata 55 % da tia rubo. La cindron oni ŝutas sur deponejon.

Ankaŭ la aliaj aŭstriaĵ liglandoj (federaciaj landoj) devas baldaŭ uzi rubobruligejojn, ĉar pro nova leĝo mastrumada rubo ne estu metita deponejen ekde la jaro 2004. La pordeponeja rubo enhavu ne pli ol kvin elcentojn da karbono. Tial oni bezonas ĝis 15 rubofornegojn.

Suba Aŭstrio, la plej granda liglando, konstruos 300 000tunan rubofornegon apud la iama atomcentralo

Zwentendorf [sventendorf], en kiu nun troviĝas trejnejo por dogan-ĝendarmoj. Same en la liglando Karintio oni ne scias kien meti 180 000 tunojn da rubo ĉiujare. Oni planas eviti 60 000 tunojn kaj bruligi la reston. La aliaj federaciaj landoj kolektas ne sufiĉe da rubo por propra bruligejo, ili eble transportos ĝin al Germanio.

En Supra Aŭstrio estiĝos „recikla parko“, do recikligejo por ĉia rubo. Oni produktos varmon por 15 000 privataj domoj. bruligante 160 000 tunojn da rubo en ĉiu jaro, kiuj venas de 300 000 loĝantoj.

La verduloj vidas alternativon: Eblus ankaŭ „malvarme trakti“ la rubon, ekzemple per fermentado. Ĉar la fum-filtriloj estas jam ege efikaj la homoj alkiutimiĝos al la brulig-ebleco kaj ne plu evitos aŭ ne plu laŭspece kolektos la rubon.

Walter KLAG

PARAZITOJ

Tineo ruinigas kaŝtanojn

De antaŭ dek jaroj la samo: la hipokaŝtanoj floras en majo, bele kreskas la folioj, sed jam en junio ili ekvelkas. La ĉefa aleo en la viena Prater¹ peras aŭtunan impreson jam somere. Fakte la arboj ne mortas. La kaŝtanfruktoj bone maturiĝas kaj estas kolektataj de infanoj en oktobro.

Tiu biologia katastrofo estas la laboro de insekto: la minista tineo², kies malsategaj larvoj voras la foliojn. La tineoj travintras en la falintaj folioj, kaj sekvajare la ciklo rekomenciĝas.

Ne estas certe, kiel la tineoj venis en Aŭstrion. Eble iu biologo kaptis kel-

kajn en iu ekzota lando kaj poste liberigis ilin, aŭ ili eskapis, kaj dum kvin jaroj ili disvastiĝis en tuta Aŭstrio. Kontraŭ alikontinenta parazito niaj arboj ne havas naturan defendkapablon. La folio sur la bildo estas de kaŝtano en Stirio, 160 km sudokcidente de Vieno. Kvankam tiu arbo staras tute sola, ankaŭ ĝin trovis la parazitoj.

Kion fari? Ĉu atendi, ĝis tiu „epidemio“ mem estingiĝos? Du procedoj efikas jam nun:

a) Kolekti en aŭtuno la falintan foliaron kaj bruligi ĝin. Tiel la tineoj mortas.

b) Lozigi la teron ĉirkaŭ la malsana arbo, kiu reekviglas kaj iĝas iel imuna kontraŭ la parazitoj.

La plej bona rimedo estos verŝajne jena: oni bredas vespospecion, kies larvoj kreskos en la tineoj. Do parazito kontraŭ parazito! Eble post kvin aŭ dek jaroj oni povos aĉeti tiujn vespojn en ĉiu zoologia fakmagazeno.

Walter KLAG

1. Prater = Granda parko en la dua distrikto de Vieno. 2. Provizora esperanta nomo; germane *Miniermotte*.

ĈINIO

Aĉaj kosmetikaĵoj

En la ĉina merkato troviĝas diversspecaj kosmetikaĵoj kaj belig-ŝmiraĵoj. Krom la produktitaj en Ĉinio mem, multaj el ili estis kontrabanditaj aŭ portitaj de vojaĝantoj kaj pere de neregulaj importaj ĉeneroj penetris en Ĉinion. Ilia kvalito kaj higiena stato ja havas gravajn mankojn. Por profiti fikomercistoj kaj malbonaj beligadlaborantoj senekzamene kaj laŭdezire vendas kaj uzadas ilin. Tiuj aĉaj kosmetikaĵoj jam al-

portis al multaj konsumantoj seriozajn damaĝojn korpe kaj anime.

Laŭ enketo rilata al la kosmetikaĵoj, ekzistas tri ĉefaj problemoj. Unue, iuj kosmetikaĵoj, kiaj pomado, vangruĝo kaj lipfarbo, enhavas anestezion uzmalpermesitan de la ŝtato, kaj en iuspeca „lakto“ eĉ aldoniĝis blankiga kemiaĵo. Due, en pluraj kosmetikaĵoj malutila kemia substanco ofte superis la difinitan normon; ekzemple, likvajho por fiksi hararformon enhavis metanon je 0,4 %, superante la normon unuoble. Trie, la kvanto de bakterioj estas super la normo. Laŭ nekompleta statistiko ĉiujare en Ĉinio la vizaĝdifektaj akcidentoj nombras pli ol 200 000; la plimulto estis kaŭzita de tio, ke suferintoj uzis kosmetikaĵon falsan kaj malaltkvalitan. Tre teruras vizaĝdifekto, do singardaj virinoj jam emas ne plu aĉeti kosmetikaĵojn.

Mu Binghua

AŬSTRIO


Atomcentralo iĝis lernejo

Ekkonstruita en 1972, nuligita en 1978, la atomcentralo ĉe Zwentendorf [sventendorf], 50 km okcidente de Vieno, estas la plej sekura en la mondo. La 5an de novembro 1978 voĉdonis 50,47 % de la aŭstroj kontraŭ tiu atomcentralo, kies konstrukostoj estis 1,2 miliardoj da eŭroj. Ĝi neniam produktis elektran kurenton. Valorajn konstrupartojn oni povis vendi, sed kion fari el la ruino? Alikonstruado en gasbruligan centralon estus tro multekosta. Por tuta malkonstruado ne estis mono.

En 1998 malaperis la dogana limo inter Aŭstrio kaj Germanio. B Nun oni bezonas laŭ la kontrakto de Schengen [ŝengen] 100 ĝendarmojn por kontroli la „eksteran limon“ de Aŭstrio, do la limon al la ne-eŭrop-uniaj landoj Ĉeĥio, Slovakio, Hungario kaj Slovenio. Por la trejnado de tiuj oficistoj mankis instruejo. Tiu oni instalas en la iama atomcentralo. Okazas daŭre kursoj tie por lim-ĝendarmoj, kiuj povas ankaŭ tranokti en la betona konstruaĵo.

Tiu plej multekosta trejnejo de la mondo estas vera kuriozaĵo!

Walter KLAG



Folio de kaŝtano ruinigita de ministaj tineoj

Viajn kontribuojn por la rubriko „medio“ sendu al:

Claude Rouget
Nedre Markv. 27
N-9011 Tromsø
Norvegio

Retpoŝto: claudio@tr.telia.no

KASTELO RADHADESH

Spirita programo dum la tuta jaro

Ĉiujare fine de julio okazas la somera festivalo en la kastelo Radhadesh, Belgio, ĉe la spirita komunumo de Kriŝno-konscianoj. En 1998 la bunta evento allogis ĉirkaŭ 2000 personojn interesatajn pri la tradicia kaj samtempe moderna gemonaftejo kaj la veda kulturo.

Kasteleto en monteta ĉirkaŭo

En Septon-Durbuy, Belgio, urbeto en la regiono de Ardenoj, troviĝas ĉarma grizŝtona kastelo, kiu dum multaj jarcentoj havis diversajn loĝantojn kaj funkciojn. Interalie ĝi funkciis kiel ripozejo kaj malsanulejo, kaj fojfoje oni tie eĉ produktis vampir-filmojn. Ekde 1980 ĝi servas kiel templo kaj monaftejo de la Internacia Societo por Kriŝno-Konscio, konata ankaŭ kiel ISKCON aŭ Harekriŝna movado. Dum tiu ĉi semajnfino oni montris la tutan spektron de la veda kulturo, kiu ekestis en Barato antaŭ pli ol 5000 jaroj.

Plej maljuna bovino

La gemonaftejoj vivas strikte vegetare kaj konsumas neniajn narkotaĵojn (nek alkoholon, tabakon aŭ kafon). Ilia motivo estas „simpla vivo kun alta konscio”. Konscio precipe pri Kriŝno (unu el la multaj sanskritlingvaj nomoj de Dio), sed ankaŭ respektoplena traktado de la naturo, kaj ĉiuj kunkreaĵoj estas parto de la vivstilo. Ne mirinde do, ke oni varbas por senvianda nutriĝo kaj bestoprotektado. Sur la herbeja angulo de la tereno herbumis Gaura-Matti, la plej maljuna bovino en Belgio – ŝi aĝas 18 jarojn.


La bazoj de Kriŝno-konscio

Dum la rondiro la vizitantoj vidis lumbildaĵon, kiu bunte klarigis la fonon de Kriŝno-konscio. Ĝi estas tre antikva tradicio, kiu nur en la sesdekaj jaroj venis al la okcidenta mondo, kaj ne iu novspeca sekto (kvankam en la unuaj jaroj en Okcidento oni havis tian impreson pro skandaloj kaj fanatika konduto). En 1965, monaĥo 70-jara, Bhaktivedanto Svamio Prabhupado, portis la tutan vedan filozofion kaj spiritan kulturon al Nov-Jorko kaj trovis tie inter la hipioj la unuajn adeptojn, kiuj pretis por la Sinjoro rezigni pri ĉiaj drogaĵoj kaj eki morrigidan vivon. Ene de malmultaj jaroj la movado disvastiĝis sur la tuta terglobo, kaj famiĝis unuflanke pro la (el okcidenta vidpunkto)

to) malkutimaj vestaĵoj, aliflanke pro siaj vegetaraj restoracioj.

Prabhupado dum sia fina vivparto, ĝis 1977, tradukadis multajn spiritajn vedajn verkojn al la angla, kaj la libroeldonejo fondita de li estas nun unu el la tri plej grandaj religiaj eldonejoj en la mondo. Dum tiu tempo helpe de siaj adeptoj Prabhupado malfermis pli ol 100 templojn, lernejojn kaj bienajn komunumojn.


La filozofio baziĝas sur la vedaj



Bhaktivedanto Svamio Prabhupado



Kriŝno-monaĥino klarigas ĉiujn detalojn al la vizitantoj sur la kastela tegmento.



La kastelo Radhadesh

Skriboj, la malnovegaj verkoj skribe fiksita antaŭ 5000 jaroj en la sanskrita lingvo (la plej malnova konata lingvo). Inter tiu tre ampleksa verkaro la plej centra spirita ero estas la Bagavadgito, la *kanto de Dio*, same konata en Barato kiel la Biblio en Okcidento. Ĝi klarigas, ke ĉiuj vivaĵoj estas spiritaj animoj, kiuj enkarniĝas, konforme al sia konscio, en diversaj korpoj. Laŭ la leĝo de karmo, al bonaj agoj okazas bonaj reagoj, al malbonaj agoj malbonaj. La celo estas restarigi la forgesitan

ligon al la Sinjoro (Kriŝno aŭ Viŝnuo), kaj reiri al la eterna, spirita mondo por tie ĝui kun la Sinjoro sen sufero eternan beatecon. Grava maniero rememori kaj servi Kriŝnon estas la ĉantado² kaj kantado de Liaj nomoj: „Hare Kriŝna”. Tio donis al la movado ĝian kromnomon.

Bunta programo

Ke monaĥejo vivo ne estas io teda, tion prezentis la devotuloj³ dum du tagoj per riĉa programo. Sur entenda scenejo diversnaciaj muzikistoj kaj grupoj prezentis kaj tradician kaj modernan spiritan muzikon per klasikaj barataj kaj elektronikaj instrumentoj. Pantomimisto montris scenaĵon pri renkarniĝo. Iu juna, kolore vestita virino montris graciegan templodancon. Tiu dancstilo estas tre detaliĉa; por lerni ĉiujn membro-, kapo- kaj okulmovojn necesas dekoj da jaroj. Muzikalo bel-



Tradiciaj instrumentoj: mridango maldekstre kaj harmoniumo meze



Muzikalo el la Mahabharato



Vendobudoj

kostume montris parton el la Mahabharato, la plej granda epopeo de la mondo (ankaŭ parto el la vedaj Skriboj). Kaj ne mankis filozofiaj prelegoj pri Kriŝno-konscio, francelingve kaj nederlandlingve. Ĉar la vizitantoj tamen venis ne nur el Belgio, ankaŭ la anglan lingvon oni uzadis por interkompreniĝi.

Unu el la ceteraj kulminoj estis veda geedziĝa festo: du kriŝnanoj el Polio iĝis geedza paro antaŭ fajroofero. Preĝisto ĉantis specifajn sanskritajn mantrojn⁴, kaj la paro ofere jetis rize-rojn en la fajron. Brue finiĝis la festivala semajnfino nur post noktomezo kun danca kantado de *Hare Kriŝna* kaj aliaj mantroj instrumente akompanataj.

Dum ambaŭ posttagmezoj la devotuloj servadis al la malsataj vizitantoj vegetarajn pladojn, kiujn ili preparis en la granda kastela kuirejo. En budoj starigitaj en la floriĉa ĝardeno akireblis plej diversaj aferoj por spirita vivo: filozofiaj libroj, muziko, tradiciaj vestaĵoj hindiaj, incensaĵoj, bildoj de sanktuloj... La kastela gemonaĥejo havas krome apartan bakejon, en kiu bakiĝas ĉiutage freŝa pano, glaciaĵoj, kaj vegetaran restoracion, kie oni povas gustumi la delikataĵojn de la fama veda kuirarto. Ŝajne ne sen kialo la kastelo bonvenigas ĉiun jaron pli ol 32.000 vizitantojn el la tuta mondo.

Bob L. GARMOYER

La adreso: Radhadesh, Château de Petite Somme, 6940 Septon-Durbuy, Belgio, telefono +32-86-32 29 26, telekopiilo +32-86-32 29 29 (plej proksima trajnhaltejo: Barvaux)

- 1 Vedo, veda = la prahindiaj sanktaj skriboj, de la vorto „veda” = scio
- 2 ĉanti = reciti
- 3 devotulo = iu, kiu devotis sian vivon al Dio, monaĥo (ĉi-kuntekste iom malkiel en PIV)
- 4 mantro = diro, preĝo, laŭvorte mensliberigilo (*mana* = menso, *tra* = liberigi)

INTERRETO

Elektronike
lavita teksaĵo

En multaj landoj estas kutimo distribui reklam-presaĵojn al leterkesto. Kiu ne ŝatas ricevi tiajn inform-disĵetaĵojn, povas protekti sin per ŝildeto, kiun en kelkaj landoj oni eĉ devas respekti. Sed dum sufiĉas la spaco en la leterkesto, oni perdas nur la tempon necesan por elsarki kaj forĵeti la nepetitan reklamon.

Ankaŭ en la Tut-Tera Teksaĵo (TTT) delonge estas kutime, ke la kostojn de iu ret-servo pagas „mecenato”, kies reklamo tiam aperas sur ĉiu dissendata paĝo. Male al paperaj reklamoj la ricevanto ne nur ofte devas pagi la transsendokostojn por la reklamo, sed ankaŭ atendi la deziratan informon, dum alvenas la nedezirataj varbobildoj – kaj dum la atendotempo eble pagi la telefon-ligon.

La situacio estas iom paradoksa, ĉar la inform-provizantoj ne trudas la varbaĵojn: ili sendas informpaĝon, sur kiu troviĝas la ret-adresoj de bildoj, kiuj enhavas reklam-mesaĝon. La krosilo (TTT-legilo) de la uzanto tiam eksplicite petas la sendon de la bildoj, ne sciante, ke ili la uzanton eble ne interesas.

Tiun fakton utiligis programistoj de la internacia firmao *Siemens* [zimens], kiu nun en sia filio en la germana urbo Paderborn eldonis defendilon: la programo *Web Washer* (laŭvorte „teksaĵ-lavilo”) metas sin en la ligon inter TTT kaj la loka krosilo kaj elfiltru („el-lavas”) la ĝenajn reklamojn. Kvankam ĝi ne povas analizi la enhavon de la retpaĝoj, ĝi enhavas multajn laŭspertajn regulojn por distingi grenon de pajo: dum la aŭtoro elprovis la programon, ĝi elfiltru el 1500 bildoj pli ol 200, kaj ŝajne neniam forĵetis ion gravan. La aspekto de la lavitaj paĝoj ĉiam estis en ordo. La aliro al multaj TTT-ejoj rimarkinde plirapidigis.

Eble ne mirige, ke kelkaj reklam-agentoj akre protestis kaj avertis kontraŭ la danĝeroj de la lavilo: ĝi ne nur povus kaŭzi la retiriĝon de mecenatoj, sed eĉ subfosi la moralon de la uzantoj, kiuj „ŝtelakiras” informojn sen pagi per la legado de reklamo. Ĉar, kiel dirite, la lavilo ne legas la reklam-enhavojn, sed laboras laŭ formalaj reguloj, oni nun volas ŝanĝi la teknikon de la varbanoncoj. Post tio la lavilo devos lerni novajn regulojn, kaj povus ekesti simila batalo kiel inter komput-

ilaj virusoj kaj kontraŭvirusaj programoj.

Multe pli racian sintenon evidentigis Volker Nickel [volka nikel], parolkomisiito de la Centra Asocio de la Germanaj Reklamistoj, dirante: „Kiu ne deziras reklamon, tiu ja ne interesas nin.” Laŭ li la spezo de la interreta reklamado en Germanio duobliĝis en la jaro 1998, atingante 50 milionojn da markoj (25 milionojn da eŭroj). La lavilo ne minacas la reklamistojn per bankroto. Reinhard FÖSSMEIER

Retpoŝtaĵoj venos ekde
nun ankaŭ telefone

Ĉu en feria vojaĝo, en aŭto aŭ hejme: estonte Interret-uzantoj ne plu devos rezigni pri la ricevado de retpoŝtaĵoj, se ili ja ne disponas pri komputilo. La germana firmao *Siemens* jam evoluigis teknikon, per kiu eblas telefone ricevi retpoŝtaĵojn. La skribitaj informoj estas transformataj en parolajn kaj laŭlegataj al la uzanto.

La nova programo nomiĝas *DICE* („Delivering Information in a Cellular Environment” – ankaŭ hispana aŭ itala

Sendu elektronikan
poŝtkarton


Ĉe la retadreso <http://www.all-yours.net/postcard/dp.html> oni povas sendi kaj ricevi senkostajn elektronikajn poŝtkartojn. La klarigoj estas ankaŭ en Esperanto. En tri ŝtupoj oni laŭplaĉe kunmetas fotojn, muzikon, tekston, fonon, kolorojn, ktp, indikas la propran retpoŝtan adreson kaj tiun de la ricevonto. La firmao sendas al tiu retmesaĝon, ke troviĝas poŝtkarto por li aŭ ŝi en la cifereca poŝtejo, kaj sekretan numeron, per kiu oni povas preni la karton. Ĉar oni povas multe pli individue ol per tradicia poŝtkarto krei etajn tre personajn artaĵojn en nur kelkaj minutoj, tiaj „retkartoj” certe estas agrablaj kaj bonvenaj surprizoj por la ricevanto. Bernhard PABST

vorto kun la signifo „diras”). Algoritmo estas aplikata por analizi retpoŝtaĵojn kaj TTT-paĝojn kaj poste aŭdigi ilin kiel parolaĵon. La specifaĵo de la *DICE*-procedo konsistas en tio, ke grafikaranĝaj trajtoj de dokumentoj estas analizataj kaj komunikataj al la uzanto. Tiunmaniere eblas transigi en parolaĵon ankaŭ forte strukturitajn dokumentojn, sen konfuzi ilin.

Por uzi *DICE* necesas telefone elekti la koncernan servon, kiu troviĝas en propra komputilo, en oficejo aŭ ĉe publika servo. Oni povas elekti per la telefona klavaro diversajn TTT-paĝojn helpe de legosignoj kaj ankaŭ venigi retpoŝtaĵojn. Por multaj taskoj sufiĉas premi malmultajn klavojn kaj aŭskulti. *DICE* disponas ankaŭ pri foliumilo direktebla per klavoj, per kiu oni povas legi hipertekstojn. La programo obeas parolregajn funkciojn kiel ekzemple „antaŭen”, „paŭzo” aŭ „malantaŭen”.

Al retpoŝtaĵoj oni povas respondi per parolaj komunikoj, kiuj estas liverataj al la korespondanto kiel voĉpoŝtaĵoj. Tiunmaniere eblas kompleta komunikado ambaŭdirekta inter Interret-kaj telefon-uzantoj.

DICE povas prilabori ankaŭ ilustritajn TTT-paĝojn. Dum ties aŭdigo estas indiko, ke la komunikado enhavas ankaŭ bildon. La aŭskultanto estas alvokata premi difinitan klavon de la telefono. *DICE* ekmemoras tiun indikon kaj zorgas pri tio, ke la uzanto povu poste rigardi la bildon ĉe la propra komputilo. Evgeni GEORGIEV



Senhalte kreskas la nombro de uzantoj de Interreto kaj similaj komunikiloj. Plej multe uzas ilin usonanoj kaj eŭropanoj (kune 70 elcentoj de tutmonda nombro) – kaj ankaŭ la nombro de Esperanto-parolantoj en Interreto kreskas konstante.

Maryvonne kaj Bruno Robineau

Unu tero, multaj kulturoj

Sur la kamparoj de l' mondo (4)



Suka kollu: la espero estas miljara

Je la sojlo de la 21a jarcento, la kamparanoj en la bolivia altebenaĵo ree praktikas forgesitan miljaran teknikon. Neregistaraĵoj kaj internaciaj agentejoj estas ne malmultaj en Bolivio. Iliaj agnomiaj inĝenieroj, kiuj tre bonintence alvenas kun, en siaj pakaĵoj, plibonigitaj semoj kaj sterkoj, ofte senkuraĝigite foriras: ne, nenio farebla ĉi tie, tro malmilda estas la klimato, tro malriĉa estas la tero. Kaj tamen ne ĉiam tiel estis.

Tivanaku verŝajne belege aspektis kun siaj majestaj piramidoj, siaj temploj, siaj skulptitaj bareliefoj orkovritaj. La ĉefurbo situis ĉe la koro de imperio etendiĝanta de la nordo de Ĉilio ĝis la spronoj de la amazoniaj arbaroj de Peruo, en la 11a jarcento de nia erao. Poste alvenis inkaaj invadantoj kaj hispanaj konkeristoj; forgesigis Tivanaku kaj ĝia monumenta ĉefurbo.



Suka kollu en Copacabana.

Ekkono de arkeologoj


Laŭ Allan Kolata, usona arkeologo, kaj lia bolivia kolego, Osvaldo Rivera, ambaŭ edukitaj ankaŭ kiel agnomoj, ĉe sia apogeo la urbo Tivanaku verŝajne nombris 120 000 loĝantojn, kaj la loka agrokulturo produktis kromaĵojn, kiuj ebligis teritorian kaj kulturan ekspansion de la imperio. Sed kiel urbo kapablas nutri sian loĝantaron en tiu dezerta pampo, submetata al ĉiuj severaj veterkondiĉoj, kie la kultivaĵoj frostiĝas mezsomere aŭ estas inundataj de la salhavaj akvoj de la lago? Nuntempe la pampo de Koani eĉ ne kapablas nutri la 7000 loĝantojn, kiuj, en La Paz, iom post iom densigas la fluon da senlaboruloj.

Roberto Cruz verŝajne ne troviĝos inter ili, ĉar li ree esperas pri agrokulturo depost tiu tago, en 1987, kiam li renkontis Allan Kolata kaj Osvaldo Rivera, kliniĝantaj sur liaj kampoj. Ambaŭ nekonatoj rakontis al li strang-

aĵojn: ke lia tero, nun uzata nur por nutri liajn lĵamojn, verŝajne estis tre fekunda; ke la strangaj termontoj, kiujn li ĉiam konis, kaj kiuj donis al la pejzaĝo la aspekton de giganta onda lado, estis la postrestaĵoj de sistemo de platformoj apartigitaj de kanaloj; kaj ke li povus revivigi ĉion ĉi kaj ree produkti ĉi tie terpomojn. Tiam temis nur pri hipotezo; necesis ĝin kontroli.

Roberto Cruz konvinkigis provi la eksperimenton kaj prisemis unu el tiuj platformoj ĉirkaŭataj de kanaloj, kiuj estis rearanĝitaj - unu *suka kollu*, ajmara termino, kies signifo estas „plialtigita kampo”. Tamen, iun februaran nokton (do dum sudhemisfera somero), okazis tio, kion li tiom timis: severa frostoj. Matene la kamparanoj konstatis, ke difektigis 90 % de ilia rikolto de terpomoj. Kiam siavice Roberto malsupreniris en sian *suka kollu* por konstati la damaĝojn, li tre miris vidante, ke blanka nebuleto ko-

Fotoj: Maryvonne kaj Bruno Robineau



Cori Mamani tre fieras pri sia fabokampo.



Dank'al suka kollu, tiuj ajmaraj virinoj retrovis esperon. Ili partoprenas en festo por danki la tero-patrinon pro ties bonkoreco.

vras lian kampon, „kvazaŭ kovrilo sterniganta je 90 cm super la grundo”. Ankoraŭ pli granda estis lia surprizo, kiam li konstatis, ke liaj plantoj multe malpli suferis ol en la apudaj kampoj. Kelkajn monatojn poste li engarbejigis rekordan rikolton. Tio estis la unua rearanĝita *suka kollu*; nuntempe ili ampleksas 128 hektarojn en 53 vilaĝoj.

Retrovi scion

En tiu „kovrilo” de nebulo, kiu tiel efike protektis la rikolton de Roberto,

kuŝas la genio de la *suka kollu*. Ĉar la altebenaĵo havas sunplenajn tagojn, la akvo de la kanaloj varmiĝas; kiam ĝi vaporiĝas, la miksiĝo de la vaporo kun la nokta malvarma aero formas tiun nebulan kovrilon, kiu ŝirmas la lantojn kontraŭ frosto.

La agronomo Juan Ramirez ĉeestis, kiam okazis la unua rikolto en la *suka kollu* de Roberto Cruz. Pri tio li memoras, kvazaŭ estus okazinte hieraŭ: „Skandale altaj estis la rendimentoj. Estis proksimume po 23 tuberoj por ĉiu plantaĵo, dum ĉi tie oni ĝenerale ricevas nur po kvin aŭ

ses. Konvinkitaj, la kamparanoj kisigis la terpomojn. Por ili tiu rikolto signifis luvivi.” Efektive la kamparanoj neniam vidis tion: rendimentojn de 20 t/ha, preskaŭ dekoblo de tio, kion ili kutime ricevas! Kaj poste konfirmiĝis la rezultoj. Tiuj *suka kollu* ankaŭ produktas bonajn rezultojn por aveno, hordeo, cepoj kaj faboj.


Fido al praavoj

Osvaldo Rivera kaj Allan Kolata tre ĝojas pro tio, ke ilia laboro de arkeologoj donis esperon al multaj kamparanoj, rehavigante al ili la teknologion de iliaj praavoj. „De jarcentoj ni, bolivianoj, opinias, ke tio, kio venas de eksterlando, estas pli bona, kaj ĉiam de eksterlando oni serĉas solvojn al niaj problemoj. Tio naskis ian mensan dependecon. Ĉi tie ni povas redoni al la kamparanoj fidon al siaj pravoj, al si mem, por ke ili retrovu sian propran valoron. Jen la fundamenta bazo de la evoluado”, konkludas Osvaldo Rivera.

En tiuj *suka kollu*, la andaj kamparanoj ĉefe vidas plian pruvon de sia kutimindiro: „Necesas antaŭeniri rigardante la pasintecon.”

*

Pri siaj spertoj dum okjara vojaĝo tra la mondo la aŭtoroj detale raportas en sia libro *Ili vivis sur la tero*, mendebla ĉe FEL (vidu recenzon en MONATO 1/99, p.22)



Tiwanaku: antaŭ 1500 jaroj, estis vasta imperio, grandega ĉefurbo, kaj prospera agrikulturo.

de Bruno Vogelmann

Prezentado de noveca mondkoncepto

Bruno Vogelmann

La Nova Realismo - La konsekvenco de la Nova Pensado, aperinta en 1989, FEL-Antverpeno-Belgio tradukita kaj tradukata en 27 lingvojn, el kiuj aperis en libroformo jenaj: albana, angla, bulgara, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, mongola, pola, rusa, rumana, serba, Esperanto.

Pri noveca mondkoncepto

Robert Jungk, la fama pacesploranto kaj futurologo, juĝis pri la „Nova Realismo”: „Tio estas la mondkoncepto de la estonteco.” Per kio tiu eldiro pruvas?

Fakto estas, ke la homoj vivas disigitaj en multaj grupoj: popoloj, klasoj, sociaj tavoloj, partioj mondkonceptaj kaj religiaj. Ĉiuj tiuj grupoj defendas apartajn interesojn kaj volas realigi siajn grupajn celojn. Tia konduto ofte kaŭzas rezulton, per kiu unu parto venkas kaj la alia parto venkatas. En tia rezulto ekzistas jam nova ĝermo de estontaj konfliktoj. Certe necesus solvoj, kompromisoj, kiuj konsideras la interesojn kaj bezonojn de ĉiuj partoj, por ke ili garantiu longdaŭran solvon, kiu helpas certigi la pacon.

La koncepto de grupo ofte malebligas tian solvon per deklaro de la grupa koncepto eterna kaj neŝanĝebla veraĵo. Tia deklaro, kies enhavo de vereco normale ne estas kontrolebla, ni nomas dogmo. Tia dogmismo kaŭzis regule dum la historio perfortregadon kaj netoleremon kun sekvo de terura subpremo. Milionoj kaj milionoj da homoj perdis pro tio liberecon kaj vivon.

Nova mondkoncepto necesa

Ĉar ĉiuj tiuj diversaj bezonoj kaj intereso rezultigas mondkonceptojn kontraŭdirajn unu al la alia, estas tempo ke la homoj ricevu komunan bazon por komuna pensado. Tia bazo estas komuna mondkoncepto, por ke ili kapablu komune kaj harmonie agi. Ili devas lerni, pensi ne nur pro momenta avantaĝo, se konflikto estas solvenda. Ĉar ĉiam, kiam ni altrudas al partnero tian solvon, kiu ne konsi-

deras ankaŭ liajn interesojn, ni semas ĝermon por nova estonta konflikto.

Por kapabliĝi je tio, necesas la „Nova Pensado”, kies „regulojn” Bruno Vogelmann prezentas en siaj „5 principoj”. Tiujn la homoj devas ensorbi en sian konscion, se eble jam en lernejo, por ke ili dum sia vivo kapablu trovi per ĝusta, viva pensado daŭrajn solvojn, kiam ili havas problemojn kun kontraŭuloj, konkurantoj kaj partneroj. Tia Nova Pensado kaŭzas fine la sintenon de „Nova Realismo”, kiu sola povas esti la mondkoncepto de prospera fruktodona estonteco.

La Nova Pensado

Ĉar la pripensemaj homoj konsciiĝis dum la lastaj jardekoj, ke ni devas esti pli ĝisfundaj, estiĝis la nocio de „Nova Pensado.” Ekde 1980 multaj menciis la vortojn „Nova Pensado”, kvankam supozeble preskaŭ ĉiuj tiuj tute ne sciis, kio estas la Nova Pensado. Por ili, „Nova Pensado” ŝajnis iom pli da afableco, iom pli da preteco intertrakti, iom pli da medioprotekto kaj iom pli da pacamo. Sed la Nova Pensado estas pli. Ĝi posedas proprajn regulojn kaj, alie ol la „Malnova Pensado” kun ĝia denaska logiko, la Nova Pensado estas viva pensado. Ĉar la denaska logiko rezultigas ofte miskonkludojn, pro la denaska logiko, kiu utiligas nur la linearan kaŭzecon.

La Nova Pensado atentigas kaj utiligas la interplektitan kaŭzecon, kiu ne nur atentigas linearan ĉenon de kaŭzoj kaj efikoj (A kaŭzas B, B kaŭzas C, C kaŭzas D...), ĝi atentigas ankaŭ ĉiujn kromkaŭzojn kaj kromefikojn, kiuj estas tre ofte pli gravaj ol la konstatita lineara efiko. Ekzemplo: En la industria kamenfumo oni observis ne nur la ĝenan fulgon. Nur longe poste oni konsciiĝis, ke la kromefike elpuŝata gaso CO_2 rezultigos estonte iom-post-ioman plialtigon de la tera temperaturo kaj fine nocan malbonigon de la tera klimato (forceja efiko).

Per atento al tiaj „interplektitaj” kaŭzoĉenoj la racio esploras la fenomenojn de la realo, kaj la racio trovis tiamaniere la 5 fundamentajn leĝojn, kiujn oni nomas la principoj de la Nova Pensado:

1. la principo de la ĉiama movo kaj ŝanĝiĝo
2. la principo de la ĉiufanka interligiteco
3. la principo de la unueco de la kontrastoj
4. la principo de la inversiĝo de kvanto en kvalito kaj male
5. la principo de suprenevoluo en interrilito de neceso kaj hazardo

Tiuj principoj estas samtempe la principoj de la subjektiva dialektiko, kiu por la homa pensado estas nura pensmetodo. Samtempe tiu dialektiko estas ankaŭ la doktrino de la ĝeneralaj movoleĝoj en la naturo, socio kaj pensado, do objektiva dialektiko.

Tiu viva dialektika pensado ne estas tute nova invento. Saĝaj homoj malkovris tiujn principojn ĉiam denove dum la praktiko de sia vivo kaj utiligas ilin. Ekzemple la Unua Principo devenas de antikva filozofo Heraklito, kiu eldiris „Pantha rei” - ĉio fluas!

Precipe en la nuna tempo, dum kiu la evoluo de scienco, tekniko kaj de la sociala sektoro akcelitas enorme, la atentado de tiuj principoj estas plej grava rilate la prosperon kaj pluekzistadon de la homoj. Aparte grava estas la principo de la inversiĝo de kvanto en kvalito kaj male. Simpla ekzemplo el fiziko:

Se oni aldonas al akvo je 20°C iun varmokvanton, la temperaturo altiĝas ĝis 21°C . Se oni ripetas tion, la akvo varmiĝas pli kaj pli kaj atingas fine 100°C . Laŭ la denaska logiko de la Malnova Pensado la temperaturo de la akvo pro plua aldono de varmo devus nun plialtiĝi je 101° , 102° , 103° ..., sed ĝi devus resti akvo. Fakte, ricevinte pluan varmon ĉe 100°C la akvo ŝanĝiĝas en vaporon de 100°C , kiun ni povas varmigi plu kaj plu (se enfermita en kaldrono, ĝi fine eksplodigas la kaldronon). Komparebla ŝanĝiĝo kun danĝeraj sekvoj povas en futuro kaŭzi subitajn katastrofojn pro daŭraj pekoj kontraŭ la vivmedio, ekzemple rilate atomreaktorojn, rilate ozontruojn, rilate la forcejan efikon, kaj rilate multajn aliajn.

Bruno Vogelmann skribis en sia libro apartan ĉapitron por ĉiu el la 5 principoj de la Nova Pensado kaj montris multajn ekzemplojn pri ĉiu principo. Tion li faris intence, ĉar ĉiu principo en sia mallonga klara teksto laŭvorta ŝajne estas tro simpla, tro klara, tro memkomprenebla por instigi la leganton pripensi la principon. Ĉiu leganto ja devus prui por si mem la validecon kaj taŭgecon de la principoj per mem serĉataj ekzemploj. Nur per tia esploro la propra pensado iĝas

pli fruktodona; pli viva kaj pli sukcesa, iĝante Nova Pensado.

Tiu Nova Pensado – se konsekvence ekzercata kaj praktikata – direktos la evoluon de la homaro al novaj, pli altaj ŝtupoj. Verŝajne la plej grava problemo de tia evoluo estas la vekigo de nova konscienco, do de nova religieco. Ĉar nur el vera, min kaj mondon inkluzivanta sencokonscio en la homo elkreskas la sinteno de respondeco por fruktodona vivo. Bedaŭrinde tia sencokonscio, do vera religieco, estas maloftiĝinta pli kaj pli, ĉar en nia socio regas la ekonomika pensado, kaj la strebado al plejeble granda profito iĝis la preskaŭ ĉion dominanta sinteno.

Religio kaj la Nova Pensado

Iurilate Nova Pensado efikas jam longtempe, kvankam sen klara konscio de la 5 principoj. Seriozaj religuloj konstatis ofte, ke eklezio kaj doktrino iagrade rigidigis kaj ke multo el la eklezio ne plu estas en harmonio kun la bezonoj de la homoj. Tial post 1945 faratis tre konscie klopodoj de renovigo kaj de pli profunda interkompreno, ekzemple per la „Interparoloj de Salzburg (Aŭstrio)“, kie inter la katolika eklezio, reprezentata de kardinalo Franz König [franc kenig] el Vieno unuflanke kaj de decidintaj ateistoj aliflanke, reprezentataj de la franca aŭtoro Roger Garaudy [roĝe garodi], komenciĝis dialogo kun la celo trovi komunon en disigitaj elementoj. La rezulto ankoraŭ ne estis kontentiga.

Ĉar ne povas tolerati, ke du tiom gravaj partoj de la homaro, kiel unuflanke la tradiciaj kredantoj kaj aliflanke la sencokonsciaj ateistoj, troveblaj en multaj sociaj tavoloj, precipe inter la intelektularo, batalas unu kontraŭ la aliaj kaj malŝparas multan energion en batalo kaj kverelo kaj ofte rifuzas kunlaboron. Male, necesus urĝe veki veran sencokonscion kaj respondecon en la homoj de la industriaj landoj, de kies konduto dependas la bonfarto de la tria mondo.

Nuntempe la materiisma kaj nurekonomika pensado de la homoj en la industriaj landoj igas forgesi, ke ili naskitas ne nur por havi kaj ĝui, sed ke ĉion, kion ili havas kaj estas, ili dankas al tiuj kaj al tio, kio estis antaŭ ili. Estante ĉeneroj en la senfina ĉeno de la vivo, ili havas la taskon konservi kaj kreskigi la ricevitaĵojn. Nuntempe la tradiciaj kredantoj kaj la seriozaj ateistoj ne plu rajtas batali unu kontraŭ la alia, sed devas komune klopodi veki en la tepiduloj, en la ĝuemuloj, en la havemuloj la necesan sencokonscion.

Kiel realigi tion, tion montras Bru-

no Vogelmann en sia verko „La nova realismo“. Pri tiu propono Elisabeth Peter de la Sekretariejo por la Nekredantoj ĉe Vatikano en Romo diras: „Jes, ankaŭ mi opinias, ke seriozaj homoj el diversaj kredoj kaj mondkonceptoj laboru kune por la vekigo de nova vivosenco en la homo kaj ke ili konduku sian vivon for de ĝuemo kaj suprajeco – al nova sencoplana estado.“

Kio estas vivo?

Ni menciis, ke la homo estas ĉenero en la ĉeno de la VIVO, de la plej frua pasinteco ĝis malproksima estonteco, kaj ke tion, kion ĉiu homo havas kaj estas, li dankas al la pasinta vivo; ke estante ĉenero li havas la taskon konservi kaj kreskigi la ricevitaĵojn, por ke la vivo atingu ŝtupojn ĉiam pli altajn.

Tiu VIVO ampleksas ne nur la vivon de planto, besto kaj homo, sed laŭ Budho kaj laŭ hindaj pensuloj ĝi ampleksas ĉion, kiu movas sin kaj ŝanĝiĝas, kio ĉiuflanke interligatas, evoluas, naskas ĉiam novon kaj strebas al nekonata celo. Al tiu granda, ĉion inkluzivanta vivo apartenas la neorgana mondo de atomoj, molekuloj kaj steloj, la baza organa mondo de plantoj kaj bestoj, la animata mondo de pli altaj bestoj ĝis la racidotita mondo de la homo kaj krome ĉio, kio trovas en la granda kosmo. Tiu granda VIVO estas la plej alta valoro, kiun ni konas. Tiu koncepto estas identa al la koncepto de la tradiciaj kredantoj je persona Dio, la kreanto de ĉio, kion konfirmas Majstro Eckhart (1260-1328) en sia „prediko pri saĝeco“ je la demando „Kio estas la vivo?“ per la vortoj „VIVO estas la esenco de Dio!“

La etiko de la nova religieco

El sia kredo, la tradicia kredanto akiris la konscion de la senceco de la monda procezo, kiu kreas de Dio kaj kiu pasas laŭ dia volo al celo destinita de Dio kaj finiĝos iam en Nova Dia Regno.

La science pensanta homo konsideras kaj spertas la konscion de la senceco de la monda vivoprocezo el la superrigardo super la riĉa evoluo de ĉiu vivo.

Ambaŭ scias, ke la homo vivas en meze de tiu granda mondaprocezo – la unu laŭ dia volo, la alia laŭ la neceso de la vivo. Ambaŭ scias, ke ili estas ĉeneroj en la granda ĉeno de la vivo kaj devas konservi, kreskigi kaj pludoni kion ili ricevis kaj estas. Tio signifas ke ili devas plenumi tiun taskon donita laŭ la unu de Dio, laŭ la alia de la neceso de la VIVO.

Ambaŭ rigardmanieroj estas esence identaj. Ili aperas kvazaŭ en paralelo, unue en la granda Duobla Or-

dono de Jesuo kaj poste en la vivomaksimo de la Nova Realismo kaj estas la bazo de la nova etiko.

La Nova Realismo

Bruno Vogelmann resumas en sia libro la esencajn ideojn de la Nova Realismo en 47 tezoj. Pli mallonge ni povas diri:

La Nova Realismo estas **mondkoncepto super ĉiuj** aliaj mondkonceptoj kaj religioj, ĉar ĝi ne rifuzas iun, escepte se ĝi estas vivodetrua. Kontraŭe ĝi inkludas ĉiujn, ĉar ĝi rigardas ilin historie kreskinta rigardformo de tio, kion ni komprenis kaj spertis ĝis nun nur neperfekte.

Tial la Nova Realismo estas ankaŭ **mondkoncepto por ĉiuj** homoj, ĉar ĝi ne postulas de iu la rezignon je sia ĝisnuna mondkoncepto aŭ religio. Ĉiu tia ja estas ĝusta en sia historie kondiĉita senco. Diferencaj estas nur la nocioj, la moroj kaj la kutimoj de ĉiu religio kaj mondkoncepto.

La Nova Realismo jesas rilate la evoluon de la homa socio la realigon de demokratio, de socia justeco, de konservado de la naturo, de plej bona edukado kaj klerigo de ĉiuj homoj, de favorado de scienco kaj arto, de certigo de la Homaj Rajtoj kaj Devoj, de internacia certigo de la paco.

La Nova Realismo estas **konservativa**, ĉar ĝi volas konservi la konservindaĵojn... kaj... La Nova Realismo estas **progresema**, ĉar ĝi volas realigi la necesan novon. La vivomaksimo de la Nova Realismo tekstas laŭ tezo 46: AGU TIEL, KE LA CELDIREKTO DE VIA VOLO ESTU ĈIAM EN HARMONIO KUN LA KONSERVADO KAJ SUPRENVOLUO DE LA VIVO!

Tiu vivomaksimo estas identa kun la granda Duobla Ordono de Jesuo, kiel nomitas Jesuo Kristo dumvive:

VI DEVAS AMI DION EL VIA TUTA KORO, EL VIA TUTA ANIMO, EL VIA TUTA MENDO kaj VI DEVAS AMI VIAN PROKSIMULON KIEL VIN MEM!

Ĉar Dio estas VIVO, kaj VIVO estas laŭ Majstro Eckhart egala al la Esenco de Dio. Via proksimulo estas kiel vi parto de la granda vivo, kiun ni devas konservi, kreskigi kaj levi sur pli altan ŝtupon.

Fine la Nova Realismo estas alvoko al la racio, kiu komprenas, juĝas kaj agas, sed ankaŭ alvoko al la animo, al la koro de la homo, kiu sentas kaj partoprenas en ĉio kio okazas. Sen Nova Realismo la gvidantoj kaj respondeculoj de la homaro ne kapablos regitiel, ke la malbonoj malpliĝu kaj militoj ĉesu. Per Nova Realismo ili kapablos trovi konflikt-evitajn solvojn por ĉiuj problemoj kaj kapablos realigi bonfarton, sanan naturon kaj pacon.

Nia celo: pli alta ŝtupo de nia vivo!

REKORDO

Per balono en 19 tagoj ĉirkaŭ la mondo

Unuafoje en la historio homoj ĉirkaŭflugis la Teron per balono sen duma alteriĝo. La sviso Bertrand Piccard [bertra pikar] (41) kaj lia brita kunpiloto Brian Jones [brajan ĝeŭnz] (51) trapasis la 20an de marto ĉi-jare antaŭtagmeze je 10:54 Mezeŭropa Tempo en la balono „Breitling Orbiter 3” en Okcident-Afriko super Maŭritanio la okcidentan longitudon de 9,27 gradoj. Tiun longitudon ili antaŭe jam unufoje superflugis la 1an de marto mallonge post sia starto en la svisaj Alpoj.

Piccard kaj Jones estis survoje, laŭ indikoj de la ĝeneva kontrolcentro, 19 tagojn, 1 horon kaj 49 minutojn, kiam ili post 42 810 km traflugis la planitan cellinion. En tiu kontrolcentro la novaĵo pri la sukcesa balonflugo estis akceptita kun granda aplaŭdo. Inter la jubiloj antaŭe estis ankaŭ Jacques [jak], patro de Piccard, kiu en 1960 subakviĝis en Pacifiko ĝis profundo de 10 916 m — tiel profunde kiel neniu homo antaŭ aŭ post li.

La 21an de marto frumatene la balonveturantoj volis surteriĝi en Egiptio. La antaŭe planita surteriĝo ĉe la piedoj de egiptaj piramidoj ne eblis pro fortaj ventoj. Tial post la enflugo en la egiptan flugspacon la balono direktiĝis suden kaj surteriĝis en la egipta dezerto. Tie ili devis atendi sep horojn helikopteron. „Ni eliris el la balonkapsulo kaj trafis grandegan plataĵon. Post tri semajnoj en la malvasta kapsulo ŝajnis al ni oportune, ke ni estas solaj en tiu

*„Breitling Orbiter 3”,
tekniko venkas
naturon, aŭ
ĉu nur naturo
indulgas teknikon?*

grandega dezerta loko”, rakontis Jones.

„Poste ni elpakis la lastajn akvobotelojn, kaj ĉiu lavis la hararon”, komunikis Jones. Laŭ atestoj de bonvenigantoj de la balonveturantoj en Ĝenevo, la fortostreĉoj de la pasintaj tri semajnoj ne estis videblaj sur iliaj vizaĝoj. „Tio estis triumfo de unu revo”, opiniis Piccard. „Estas bonege havi revojn, sed oni bezonas ankaŭ multe da konstanteco kaj persistemo.” La momento, kiam la 20an de marto la balono trapasis la cellinion super Okcident-Afriko, restos plej profunde gravurita en la memoro de Brian Jones, kiel li komunikis post la alveno en Ĝe-

nevon. Tiumomente Piccard kaj Jones sukcesis pri tio, pri kio la antaŭ ili 17 teamoj malsukcesis: la ĉirkaŭflugo de la Tero sen duma surteriĝo.


Ĉe Piccard la ĝojo pri la travivita aventuro estis bildigita sur la vizaĝo. „Dudek tagoj da pasio kaj emocioj, admirindaj vidaĵoj, eĉ en la plej malbonaj momentoj ni povis tamen gajni ion mirindan.”

Li parolis pri „nevidebla mano”, kiu direktis la balonon tra ŝtormoj kaj senventeco. Pro emociiĝo post la alveno ĉesis funkcii la voĉo de ambaŭ pioniroj de aviado, kiuj preskaŭ tri semajnojn koncentrite laboris en la balonkapsulo.

Piccard kaj Jones volas estiĝi fondatoj per duono de la gajnita premio de unu miliono da usonaj dolaroj, kiun usona bierfarejo disponigis por la rekordo. Laŭ deziro de la bierfarejo tiu sumo devas esti destinita por bonfaraj celoj. „Kiam ni supre flugis en nia ‚paradizo’, ni konsciis, ke sub ni ne estas paradizo. Militoj kaj ekspluatado, doloroj kaj suferado — ni volas fari ion, por ke la mondo estiĝu pli bona loko”, diris Piccard.

Post la fino de la spektakla ĉirkaŭflugo de la Tero ambaŭ balonveturantoj estis triumfe bonvenigitaj de miloj da homoj en Ĝenevo. Brua aplaŭdo, hurakioj kaj trumpetludo renkontis la aventuremulojn. Multaj spektantoj portis afiŝojn kun bondeziroj. La entuziasma humoro egalas al tiu en futbalstadiono post enigo de decidiga golo.

Evgeni GEORGIEV



La sviso Piccard kaj la brito Jones post sia sukcesas balonveturado

AFRIKO

Malio

Situanta en la koro de Okcidenta Afriko, Malio estas franclingva lando, kies teritorio ampleksas 1 248 238 km². Ĝiaj najbaraj landoj estas Senegalio, Ebur-Bordo, Gvineo, Burkino kaj Niĝero. Malio troviĝas en la norda hemisfero, inter la 10a kaj 20a gradoj de norda latitudo.

Kiel lando de la civilizacioj nigrulaj kaj arab-berberaj, Malio iĝis dum la jarcentoj loko, kie malsamaj popoloj aŭ etnaj grupoj renkontiĝis, vivis pace, interŝanĝis kulturojn kaj eniris unikan simbiozon. Tiu ĉarma lando invitas la turistojn malkovri ĝin, esplori ties riĉajn kaj sennombrajn manierojn de manifestiĝo, ekkoni ĝiajn vidindaĵojn kaj arton, fari ŝipvojaĝon laŭ la rivero Niĝero deokcidente orienten, ekkonante la anojn de kelkaj popoloj.

Gvidate de turismaj ĉiĉeronoj kaj veturante per ĉiutere ne taŭgaj veturiloj aŭ per kanotoj sur riveroj, oni povas malkaŝi, analizi kaj kompreni la riĉan, varian kaj kompleksan arton malian konforme al la imago de ĝiaj kreintoj.

Historio

Malio estis lulilo de fama civilizaĵo, en kiu regis potencaj regnoj. La regno de Ĝana (aŭ Vagadu) datiĝas de la 4a jarcento. Poste ekestis la regno Mali en la 11a jarcento. Ĝi etendiĝis de Atlantiko ĝis la riverkurbiĝo de Niĝero. Tiam la karavanoj, kiuj transportis ŝarĝojn de kupro, salo, oro kaj ŝtofoj, evoluigis la lokan ekonomion. La ekonomiaj interŝanĝoj ebligis ankaŭ kulturajn kontaktojn, kaj tiunmaniere estiĝis civilizaĵo nigrula-araba-berbera, kies centroj fariĝis Timbuktu, Gao kaj Ĝene. La armeo de la reganto Musa (1312–1337) havis 100 000 soldatojn. Sed baldaŭ alia regpotenco anstataŭigis lian regnon. Estis fondita la regno de Songoj. Ties fondinto estis Soni Aliber (Ali la Granda), kiu regis 27 jarojn.

Ekde la 17a kaj 18a jarcentoj la grandaj regnoj diseriĝis, estiginte la reĝlandojn. De 1850 komenciĝis la ko-



Mi amas Bamakon



Vidaĵoj de Bamako


lonia penetrado. Unue ekestis Alta Senegalio-Niĝero, poste Franca Sudano. Malio restis franca kolonio ĝis 1956. En 1959 estiĝis Granda Federacio de Malio kaj Senegalio, kiu ĉesis ekzisti en 1960.

La 22an de septembro 1960 la lando rompis ĉiujn ligojn kun Francio kaj proklamis sian sendependecon, akceptinte la nomon Respubliko Malio. Ĝia unua prezidanto estis Modibo Keita.


Malio havas ok regionojn kaj unu distrikton (Bamako). Kun siaj 10 000 000 loĝantoj ĝi estas vizitinda turisma lando.

Kulturaj tradicioj

Malio havas varian kaj riĉan kultu-



La porto de Djenné



ron: masko-dancoj, milit-metioj, animismaj ritoj, arkitekturo, harar-aranĝoj de virinoj.

Vestitaj laŭ la postuloj de tradiciaj dancoj, la gevoj tre ofte okupas la saman spacon sur la publika placo de sia loĝloko, dancante sub la ritmoj de diversaj muzikinstrumentoj.

La tradiciaj festoj donas ŝancon por elmontri „la arton de beleco” per la brilego de ornamaĵoj, per la koloroj de vestaĵoj kaj harar-aranĝoj. Oni distingas popolajn, ceremoniajn kaj ritajn dancojn. Ĉi-lastaj estas konservataj por iniculoj. En la regiono Dogonio oni plenumas la dancon „Kanaga” – maskodanco, simbolanta la aliĝon de la dogonoj al ilia religio.

„Takamba” ja estas eleganta kaj gracia danco kun dors- kaj brust-kurbigoj, plenumata en la regionoj de Timbuktu kaj Gao. „Haĝa” estas danco por inico al terlaboro.

Metioj

La metioj en Malio distingiĝas per siaj riĉeco, varieco kaj sperteco de la metiistoj. Ili estas fundamenta manifestiĝo de la malia kulturo. Kiel specoj de manlaboro la metioj en Malio diferencas unu de la alia en la diversaj regionoj de la lando.

Ornamaĵoj: malgrandaj ringoj (kiujn la virinoj portas je la nazo kaj je la li-
poj), grandaj orelingoj en formo de orfolioj (regiono de Mopti), fingroringoj kaj braceletoj (el bronzo aŭ el fandita vakso en Dogonio).

La maliaj maskoj estas ritaj objektoj. La aŭtentaj maskoj estas ellaborataj el lignaĵo, ĉefe prenita de iu arbo

elektita post sorĉparolo. Kolorigitaj kaj ornamitaj per fajra gravuro, la maskoj estas garnitaj per ŝtonoj aŭ per konkoj.

Korbofarado, potfarado, matoj kun tre riĉaj motivoj kaj la marokese ellaboritaj ledaĵoj estas propraj al la regionoj de Segu kaj Timbuktu.

Turismaj vidindaĵoj

La vidindaĵoj de la ĉefurbo Bamako estas: Placo de la Martiroj, monumento omaĝe al la militistoj de Samori Ture

(kontraŭulo de la franca invado), Angulo de la Martiroj (parto de la tombejo en la kvartalo Njarela), Parko de Kuluba (zoologia) kaj la nacia muzeo „Samaja”.

La urbo Kayes [kaji] situas nur kelkajn horojn for de Bamako, per trajno aŭ aviadilo. Ĝi estas ĉefurbo de la unua regiono de Malio. Ĝiaj pli gravaj vidindaĵoj estas: la fortikaĵo de Medino, konstruita en 1855 (ĉirkaŭ 12 km for de Kayes), akvofaloj de Felu, la akvofaloj de Paparah kaj la mistera monto Kita-Kulu.

La regiono de Mopti estas tre elstara el turisma vidpunkto. Ĝi havas la plej grandan nombron de turismaj lokoj. Mopti estas urbo konstruita sur tri insuloj de la riveroj Banio kaj Niĝero. La bonstato de Mopti devenas de la rivero Niĝero, kies akvonivelo ĉiam estas sufiĉe alta por ebligi la ŝipnavigadon. La rivero Niĝero ankaŭ havas insuletojn – rifuĝejoj de miloj da birdoj: pelikanoj, ibisoj, ardeoj, kormoranoj, arĝentaj ardeoj kaj anasoj. La Hombori-montaro havas unu el la plej altaj pintoj de Afriko (1154 m). Tie estas vidindaj elefantoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj.

Dogonio (Bandjagara kaj Bankas) estas vera muzeo ĉe la Dogon-monteto. En 1925 la etnologo Marcel Griaule [marsel griol] malkovris ĝin, kiel unu el la plej elstaraj lokoj de afrika kulturo. Dogonio etendiĝas sur

altebenaĵo. Iufoje eblas tie aĉeti famajn originalajn statuetojn de Bandjagara kaj Bankas. Festo de Sigi (grandega

noskitaj kiel objektoj de la monda kulturheredaĵo. Vizitindaj lokoj de Ĝene estas la bela kaj famega moskeo (konstru-

ita en la 13a jarcento kun siaj tri minaretoj, kronitaj per strutovoj) kaj la tombo de Tapano Ĝenepo (knabino, kiu sin oferis dum la fondiĝo de la urbo).

Timbuktu estas urbo nomita „Perlo de la dezerto”. Ĝia mistera allogo devenas de la arkitekturo, kiu ravas la okulojn de vizitantoj. La urbo situas ĉe

vojkruciĝo inter la dezerto kaj la riverego Niĝero. Ĝi estas fondita komence de la 12a jarcento fare de la popolgrupo tuaregoj. Timbuktu famiĝis pro siaj universitatoj kaj moskeoj, kiuj igis ĝin mezepoka metropolo de Isla-



Domo en Mopti

idolmasko): ĉiun 60an jaron oni okazigas la plej grandan ceremonian feston dogonan – la maskodanco „Kanaga”, kiu estas bildigita sur la blazono de Malio.

Ĝene estas religia urbo, nomita



Irrelli - vilaĝo de dogona popolgrupo

„Juvelo de la Nigra Valo”. Ĝi estas urbo kun multaj scienculoj kaj saĝuloj. Tie estas malnova urbocentro de komercistoj kaj intelektuloj de la Songaj-regno. Ĝi distingiĝas per sia pompa arkitekturo de multetaĝaj domoj kun fasadoj arte ornamitaj per elstaraj pilastroj kaj muretoj. La arkitekturaĵoj de Ĝene estas afrik-arabaj kaj estas ag-

mo kaj religia universitatcentro kun granda renomo.

Vizitindaĵoj: la mezepokaj moskeoj Ĝiga-Rejber, Sankore kaj Sidi-Jahija, la centro „Ahmed-Baba” pri dokumentado kaj historiaj esploroj (kiu enhavas librojn aperintajn en la 14a jarcento), kaj domoj de eksterlandaj esploristoj.

Evĝeni GEORGIEV

de Pejno Simono

La lernemulo

Ĉu ankaŭ vi envias jenajn homojn, kiuj kapablas paroli fremdajn lingvojn, senpene komutantaj de la Greka al la Turka? De la Turka al la Albana? De la Albana al la Kroata? Kaj ĉiujn ĉi lingvajn miraklojn ili okazigas en iomete kadukiĝinta turista buso eĉ sur neasfaltita strato kaj en lando kun popolo je duono ne posedanta scion pri la alfabeto. Kaj tiam, kulmine, iam poste dum fothalto antaŭ monumento de la plej fama filo de la nacio - jen aŭdiĝas: „Gesinjoroj, necesejon vi trovos maldekstre rekte apud la memorajbutiko. Ladies and gentlemen, the lavatories are over there on the left hand side of the ...”, kaj sammomente klariĝas, ke ili aldone scias la Anglan, Germanan, Francan, Italian kaj Rusan. Poste antaŭ Ĉinzano en la hotela drinkejo, kvazaŭ por finpruvi vian malsuperecon, tiu modesta mirakulo flankteme raportas, ke li ĵus okupiĝas pri la Pekin-Ĉina lingvo kaj pro tio ĉiun tagon aŭskultas kurtonde Radion Pekinan.

Nu, ankaŭ Helmuto, kiel ni ĉiuj, iam devis tiel kruele suferi. Ne estis tiel, ke Helmuto ne sciis fremdan lingvon. Aparte de sia denaska Germana, tiu juna familifondinto, fiera generinto de du infanoj, 7jaraĝa Patriko kaj 9-jaraĝa Suzana, konsentite, per iugrada plene sensignifa biologia helpo de sia bela edzino, Helga, nu, ankaŭ li sciis sufiĉe bone la Anglan. Li devis en sia profesio ofte uzi tiun ĉi lingvon en tre diversaj situacioj. Lerneje, li studis ankaŭ la Francan, sed pri tiu li neniam sukcesis. De lia vidpunkto iugrade bedaŭrinde, en Germanujo homoj sciantaj la Anglan estas tiom oftaj, kiom homoj portantaj mallongkruran ledpantalono en Bavarujo. Sekve lia lingva kapablo vere ne iel distingis lin de la vulgara popolo. Verdire ĉiu almozulo en Germanujo povas kompreni sin Angle.

Pro tio eble Helmuto klopodis konvinki sian Helgan, ke tiun jaron oni nepre feriu en Francujo. Li volis fine funkciigi sian forgesitan Francan. Helga ne tre entuziasmiĝis pri tio kaj laŭe iomete dube rigardis al la vizaĝo de sia fervoranta edzo de inter siaj du

longegaj brune nigraj harplektaĵoj. Helga verdire pli indianinis ol germaninis. „Nu, jes”, ĵuris Helmuto, „mi bezonas la Francan profesie.” Jen glata mensogo. Li bezonis la Francan nur por konvinki sin, ke li estas plene civilizita homo, ĉar evidente civilizita homo parolu almenaŭ la Anglan, la Germanan, la Francan kaj la Hispanan. Pri la Hispana li atentis pli poste, nun estu la horo de la Franca. „Mi rajtas ferie uzi la aŭton de la firmao”, li aldonis. Kaj ne pridisputeble, jen tre konvena trajto de lia dungokontrakto. Li rajtis veturi laŭplaĉe kaj ĉe tio la firmao eĉ pretis pagi lian benzinon.

Helga neniel malamis Francujon. Laŭ ŝi jen eĉ bonega ideo veturi Francujon. Do ŝia malentuziasmo fundamentiĝis ne sur la fakto, ke la francoj, kiel ĉiu scias, estas jam ekde almenaŭ cent jaroj la pramalamikoj de la germanoj. Verdire ŝia hezito baziĝis sur tre malbonvena trajto en la karaktero de ŝia edzo. Helmuto estis freneze lernema. Li lernegis ĉion.

Ekzemple elektronikon. Egale kiam kaj kie, li ĉiam sidis kun formplena faklibro en la mano kaj estis tute ne alparolebla.

„Ni havas tre altan telefakturnon tiun ĉi monaton kaj la jam antaŭmonate mankanta pago por la elekto same urĝas!”

„Mmmm.”

„Ni ne povas pagi.”

„Mmmm.”

„Ĉu vi aŭdas? Nia konto estas minusega kaj jam tricent markojn trans nia kreditlimo. Vi devos paroli kun la bankestro.”

„Mmmm.”

„Vi estas idioto!”

„Mmmm.”

„Mi enlitiĝis kun la frizisto, li estas pli lerta ol vi en la lito!”

„Mmmm. Ĉu vi diris ion al mi, kara amata musineto?”

Plej furioziga por Helga estis sendube tio, ke ŝi tute ne komprenis tion, kion li studis.

Tiel statis ekzemple pri fotografio. Helmuto aĉetis amason da faklibroj kaj mense malĉeestis dum pluraj monatoj. Liaj damnaj libroj invadis eĉ

ŝian nuptan liton. Post lia fotografia fazo sekvis lia fotografada fazo. Tiu montriĝis eĉ pli terura. Unue la kostoj por la tutaj objektivoj. Ĉiam li bezonis plian, kiu ĝuste mankis. Intertempe li havis iksnombron da ili - de 500-mm-a spegulobjektivo plus fokusdistanca duobligilo ĝis fiŝokula objektivo. Ankaŭ pri tio Helga ne havis iun imagon. Kial spegulobjektivo spegulu, se onidire la fotilo mem jam entenas speguleton? Kaj kiel fiŝokula objektivo fiŝokulu? La dua ĝenaĵo estis la fotado mem. Laŭ minuta takto ĉiu familiano devis iel speciale agi - denove preni la kaserolon denove precize kiel antaŭe senŝeligi terpomon - pli videble rideti. „Pli rektiĝu, pli malrektiĝu, alten, malalten, dekstren, pli proksimen.” Ktp, ktp. Ĉiutage embuskis atenco de blindiga fulmlampo. La plena hororo ekestis, kiam Helmuto komencis fari portretojn de la tuta familio. Tio daŭris horojn kaj horojn. Ĝis la fino de la sesio nevarie ambaŭ infanoj ploraĉis kaj ŝi estis tute nervigita. Evidente la portretoj estis poste perfektaj.

Sed Helga sciis defendi sin. Iun septembron post granda kverelo ŝi ŝlisis sin en la dormoĉambro por plori. Elplorinte, ŝi subite memoris, ke la fotilarujo de Helmuto estis en la vestoŝranko. Insida ideo atingis ŝin. Kia festo! Ŝi decidis eljeti objektivon post objektivo tra la fenestro - de la unua etaĝo - ĝis Helmuto petos pri pardono kaj promesos estonte pri... Hodiaŭ, jarojn pli poste, ŝi eĉ ne plu scias pri kio. Ĉiuokaze, Helmuto tute ne kapablis imagi tiom fian atencon kontraŭ siaj trezoraĵoj, kaj ĝis li vere ekkredis pri la trafenestra flugado de siaj objektivoj kaj, hororigite, fakte plenumis ĉiujn kondiĉojn por haltigi pliajn flugadojn, du trionoj estis neniigitaj sur la betono de la antaŭporda ŝtuparo. El la flugaĵoj rezistis la alteriĝon nur du metalaj makroringoj kaj akumulatora ŝargilo, kiu mistrafis la betonon kaj falis en florbedon. Post tiu leciono Helmuto malpli fotadis.

Sekvis ĉirkaŭ jardaŭra lernada paŭzo. Tiam Helmuto decidis okupiĝi pri egiptaj hieroglifoj. Tiu periodo ta-

men tre pace kulminis en la fidela preto de Helga brodi vertikalan egiptan „Mi amas vin” sur bruna kravato por Kristnasko. La rezulto estis vere sufiĉe interesa kaj ege imponis liajn kolegojn en la firmao. Tiuj sufiĉe enviis lin pro la vere rava beleco de lia edzino - kaj tute aparte oni enviis lin pro ŝia indiana infanvirina tute ne patrineca aspekto.

Kvankam la Helmuta kolektaĵo de objektoj estis denove kompletiginta, la vigla memoro pri ties neniigo motivis lin resti ĵus antaŭlime de refoja plena eksplodo de Helga. Li bridis sian lernemon. Nur pro tio supezeble plu ekzistas lia kilograme peza tria eldono de la „Egyptian Grammar” de iu lordiĝinta „Sir Alan Gardiner”. Tiu librego certe estus ne malpli eleganta flugonta, ol tiam lia 70-210-mm-a 2.8-f-a zomo de Pentakso.

Sed memoroj malfortiĝas kaj jen venis Esperanto. Ĉu vi ne scias, kio estas Esperanto? Nu, jen plene frenezplanlingvo de iu pola okulisto. Aŭ ĉu optikisto? Aŭ ĉu okultisto?... Pli precize Helga ne sciis. Kion ŝi bone sciis, tio estis, ke la Germana „Ich liebe dich” en Esperanto tekstu „Mi amas vin”, kio tre malmulte entuziasmigis ŝin pri iuj amaĵoj kaj efektive en ŝi provizore alvokis ĝis tiam niam spertitan spontan seksan fridecon. Sola Esperanta vorto sufiĉis por fiaskigi ĉiun plian dorlotemon. Aldone venis tiu ĉi konstanta fluo de Esperantaj libroj plej ofte mizere aspektantaj libraĉoj, kiujn oni nepre kaŝu en malluma angulo de la kelo inter la ujoj da bolkonservitaj grosoj. Helmut, malgraŭ sia inklinado al sukeritaj grosoj kun kirkremo, neŝanceleble postulis, ke ĝuste tiuj ĉi libraĉoj havu tre malfonan honorlokon sur la bretaro en la salono. Rezulte, ĉiu por babilo vizitanta najbarino tre scieme demandis pri tiuj ĉi strangajoj. Helga devis ĉiun fojon klarigi al la demandinto, kio Esperanto entute estas, kaj, farante tion, eĉ ŝajnigi konvinkon pri ĝiaj avantaĝoj. Jen lingvo lernebla dum nur kelkaj semajnoj, ege bela kaj esprimpova, la tuta homaro uzu ĝin. Ĉe tio Helga, interne furioza, pensis - tamen tiu „tuta homaro” prefere uzu Esperanton specife sen ŝi kaj ŝia kara Helmut nepre sufokiĝu je sia Esperanto komplete kun ĝia abundo da strangonaj oj-oj kaj aj-oj. Post ŝiaj ekstere konvinkprovaj klarigoj, la vizitantoj kutimis ekrigardi al ŝi kun unu el tiuj mienoj, kiuj konfidas profundan kompaton pri la ŝarĝo kaŭzata al familio pro iu freneziga parenco, kiun oni ĵus perforte per ambulanco veturigis en psĥiatrian klinikon.

Do Helmut denove kulpis pri sia destino kaj tiel ankaŭ Esperanto trovis sian adekvatan finon. Nome post kiam Helmut komencis forviŝi la belajn kanzonojn de ĉiuj muzikbendoj kaj anstataŭe registri Esperantajn radielsendojn de Pola Radio, la tuta afero iĝis por Helga ne plu eltenebla. Ŝia tuta memo profunde ribelis. Tial, iun mildveteran vesperon sensuspekta Helmut trovis ĉiujn siajn Esperantajn librojn laŭ virina povo disŝiritaj inter la rozplantoj en la florbedo de la antaŭa ĝardeneto. La infanoj gaje helpis lin kolekti kaj iomete reordigi la vente disportitajn foliojn. Plej multe ĝojigis tiu tasko la tiam ankoraŭ pli malgrandan Patrikon. Li vere entuziasme kuris de angulo al angulo kun ĉiam nova fasko da folioj en la mano, murmurante ion pri tre bela puzlo. Li ja amis puzlojn. Nur Suzana komprenis, kial ŝia patro ĉagreniĝis. „Paĉjo, eble estis vere jam iomete tro da Esperanto, ĉu?”, ŝi proponis. „Panjo certe baldaŭ retranskribiĝos.”

Eble nun klariĝas, kial Helga tiom malmulte inklinita realigi iujn feriojn en Francujo. Por ŝi tuj estis evidente, ke nun la lernado de la Franca lingvo minacas ŝin. Denove senvorta edzo. Denove amaso da libroj. Denove registraĵoj de iuj radiaĵoj. La sola afero, kiu iomete konsilis ŝin ĉe tiu perspektivo, estis tio, ke ŝi ne havas problemon konfesi pri la lernado de la Franca al la najbaroj. Pri tio oni povos eĉ fieri. Aldone, ŝajnis, ke Helmut vere ege bezonis tion. Do ŝi akordis. Aparte de tio, la ferioj okazu jam post jaruono. Tiun lernadan distancon ŝi eble povos elteni, ĉar evidente postferie lerni la Francan ne plu havus senc.

Helmut tuj aĉetis du lernolibrojn, grandan vortaron kaj kelkajn franclingvajn poŝlibrojn de Jules Verne. Nur ses monatoj restos por sukcesi. Li devos sproni sin.

Tiu memspronado kondukis Helmuton eble pli proksime al edziva kolapso ol li entute sciis. Aliflanke la jungo de amo kun plensuka amo ne estas tute senefika kaj pro tio Helga brave surŝultrigis ankaŭ tiun etapon en la intelekta evoluo de sia edzo. Nun li ne plu estis nur spirite malĉesta, li troviĝis en speco de zombia komato. Nur la alproksimiĝanta feridato esperigis ŝin pri la fino de lia studado. Krom tio, „Je t'aime” ŝajnis al ŝi pli romantika ol la Esperanta „Mi amas vin”. Eble pro tio, ke ĵus aperis disko nomiĝanta „Je t'aime”, kiu konsistis preskaŭ eksklude el voluptaj ĝemegoj de amoranta virino anstataŭ ol reala teksto. Tiu ĉi disko ĉiam eks-citis ŝin kaj estigis en ŝi tremetojn. Tre feliĉe, kvankam Helmut al ŝi re-

gule riproĉis, „Ĉe vi mankas ĉia respekto fronte al la skribita vorto!”, li ne nur vivfore inter la folioj de siaj libroj brilis. La bonulo sufiĉe lertis ankaŭ pri ŝiaj tre bazaj animalaj bezonoj. Kaj ŝi pri liaj.

La Francaj studoj de Helmut progresis. Li englutis la du lernolibrojn kaj tiam precipe klopodis pri sia nesufiĉa vortostoko. Ĉe tio li legis unu fikciaĵon de Jules Verne post alia. Estis vere herakla tasko. Pli aŭ malpli volonte la tuta familio envolviĝis en lia franciĝo. Des pli multe oni dum lia malĉeesto interne diskutis, ĉu paĉjo vere kapablos lerni la Francan dum nur kelkaj monatoj. Patriko firme kredis pri tiu kapablo de sia patro. La ina frakcio - eble pli realisma - tre dubis, ke tio eblos. Oni ne trotaksu la cerban kapaciton de paĉjo. Evidente, se li vere estus tiom klera, li ne devus ĉiam lerni ion, ĉar - tute evidente - li jam delonge sciis ĉion.

Ankaŭ Helmut komencis iomete dubi pri sia sukceso. Des pli streĉe li atendis la tagon de la ekvojaĝo. Fine, somermeze, ĝi alvenis. Oni volis transpasi la landlimon ne fore de Strasburgo kaj poste veturi tra la Voĝeza montaro, serpentumante sen specifaj celoj. Unu fina celo tamen estu: Parizo. Tiel iam tre frumatene la tuta familio enaŭtiĝis kaj aventureme veturis Francujen. Helga, pensante pri Parizo kaj la disko „Je t'aime”, Helmut, mense recitante neregulajn Francajn verbojn.

La unua ŝanco, kiun Helmut esperis havi, por testi sian Francan, estos en Strasburgo. Pro tio sur la placo antaŭ la granda katedralo li tuj klopodis pri siaj lingvaj konoj ĉe maljuna vendistino en butikoj pri memoraĵoj, tasoj, emblemoj kaj aliaj produktoj por turistoj. La vendistino, tuj ekkonante lin germano, obstinis daŭrigi la konversacion en perfekta germana lingvo. Ankaŭ kelkaj superflue alparolataj pasantoj same tuj respondis al la Francaĵoj de Helmut en perfekta Germana. Helga amuzite demandis, ĉu oni eble tute ne komprenas lin. Helmut iomete frustraciĝis.

Post horo da plua vojaĝado tra la vere belegaj Voĝejoj la feriantoj atingis la urbeton Bar-le-Duko. Jen tre vigla foireca loko kun amaso da turistoj. Tre mistere, tuj post kiam ili estis parkumintaj sian aŭton kaj elirintaj el la aŭto, ĉiuj stratoj per unu frapo malpleniĝis kaj, kvazaŭ intence, ĉiuj butikistoj fermis siajn ejojn rekte antaŭ iliaj nazoj. La sola restanta eblo estis viziti fametan preĝejon. Tiu troviĝis iomete pli alte ĉe la fino de senbutika placo, kiu aspektis preskaŭ hispaneca pro la kadukeco de la ĉirkaŭantaj

pluretaĝaj interligataj domoj kaj la multo da ŝutroj. Tiuj lastaj estis senescepte malfermitaj pro la varmeĝo kaj la placo estis plene dezerta. Feliĉe la preĝejo ne estis ŝlosita kaj oni povis eniri. Tamen ankaŭ en ĝi ne troviĝis eĉ nur unu homa estaĵo. Jen nur stranga ŝtonreliefo montranta skeletigantan kadavron kaj sub ĝi la aŭtenta skeleto mem, tamen nur kiel senorda stako da ostoj. Evidente kun skeleto Helmuto same ne povis praktiki sian novlernitan francan lingvon. Anstataŭe li tre umade fotis la ŝtonreliefon. Por tio Helga devis teni la fulmlampon tri metrojn fore de la fotilo por sufiĉe deflanke lumigi la reliefaĵojn. Dum Patriko stumblis trans la interligan kablaron kaj preskaŭ faligis la tripiedon, Suzana solene ekbruligis kandelon por la kompatinda skeleto, kiu nun eĉ postmorte eltenus la elektronikajn fulmbrilojn de ŝia patro.

La familio iel ekkomprenis, ke eĉ nord-francaj provincaj urboj kutimas ĉiutage inertigi en siesto. La horo estis la malĝusta por iuj vizitoj. Ĉar la dezerteco de Bar-le-Duko laŭtakse estis daŭranta konsiderinde plu, oni decidis pluveturi per malĉefaj stratoj en la ĝenerala direkto de Parizo. Aldone estis ege varme, la suno troviĝis jam tre alte kaj la moviĝanta aŭto promesis refreŝigan veturventon tra siaj malfermitaj fenestroj.

Post horo da aŭtado Helga rimarkis, ke la butikoj, kiuj iam kaj iam lismis la kamparajn stratojn, ne plu estis fermitaj. Do ŝi proponis, ke oni restu ie dum momento kaj trinku kokakolon, la favoratan trinkaĵon de la tuta familio. Tio okazu je la unua montriĝonta oportuno.

La tre soleca stratranda trinkejo, aŭ eble pli bone drinkejo, meze de vico de preskaŭ ruiniĝintaj malnovaj kamparaj dometoj estis tipa franca afero. Ekstere estis granda ŝildo kun bildo de cigaro. Ene estis reklamoj pri abundo da francaj drinkaĵoj. Jen maldekstre longa verŝa tablego kun vico de taburetoj. Malantaŭe staris kvindekjaraĝa tre franceca franco kun impona altkurbigita liphararo. Lia jam iomete griziĝanta hararo estis ankoraŭ densa kaj bukla. Helmuto iel intuicie sentis, ke specife tiu ĉi franco ne plu parolos la Germanan. Aliaj gastoj ne estis. Dekstre troviĝis kelkaj tabloj kun seĝetoj. La vico de tabloj kondukis al iomete pli malantaŭa fona ĉambra niĉo, kiu proponis tre bonvenan ombrecon en tiu ŝvitige varma somera tago. En tiu iomete kaŝita angulo la kvarulo sidiĝis. Patriko kaj Suzana estis plene laciĝitaj de la longdaŭra aŭtado kaj ne plu eĉ pepis. Ankaŭ Helga baniĝis en sia propra ŝvito kaj Helmuto ne multe pli kom-

forte fartis. Kvar xkokakoloj estus vere nun tre bonvenaj.

La verŝiston oni kromnomis pro lia impona liphararo „Moustache“, kion evidente neniu el la kvar sciis. Mustaĉo iris al la plej fora stratproksima fino de la verŝotablo por povi rigardi siajn kvar gastojn en la aliokaze ne enrigardebla niĉo. Lastan semajnon ĝuste en tiu ĉi niĉo estis problemoj pri kvar aliaj gastoj. Ili estis mendintaj tutan trimetan manĝaĵon, farintaj grandan spektaklon kun multe da plendoj pri tio kaj tio, kaj kulmine, tre subite estis fuĝintaj sen pagi. Mustaĉo, fine venkinte sian proŝokan senmovon, postkuris, sed tro malfrue. Li sukcesis nur noti la numeron sur la malantaŭa ŝildo de ilia malaperanta aŭto. La alarmita polico rakontis al li pli poste, ke la numero tute ne helpis, ĉar la aŭto estis ŝtelita. Pro tiu ĉi ĵusa sperto Mustaĉo nun tre atente esplorgatis al la nekonataj gastoj. Ne multaj homoj haltis tie ĉi en tiu malbela vilaĝo, konsistanta fakte nur el kelkaj domaĉoj, el kiuj du estis jam ne plu kun loĝantoj. Verdire gastis ĉe li pli ofte blatoj ol homoj kaj jen grava problemoj por li. Se Mustaĉo ne sukcesos forpeli tiujn blatojn, li perdos sian licencon. Ĉe li ne vere estis malpure. Estis simple tiel, ke la tuta malnova konstruaĵo havis tro da putra ligno kaj tro da truoj. Nu, li jam estis mendinta la veneniston. Tiu certe estis sukcesonta.

Ŝajne temas pri germanoj, Mustaĉo pensis. Sed ili tute ne parolas, kaj pro tio li ne povas certi. Aliflanke la virino aspektis kiel indianino. Eble temas pri cigana familio. Ho ve! La lastaj ciganoj pagis sian manĝon per iom surpriza valuto. Nome per tapiŝo. Ĉu li eble postulu sian monon jam antaŭmanĝe? Ne, ciganoj ili ne estas. La mallongkrura pantalonino de la viro bunta Bahama pantalonino - montras, ke certe temas pri turistoj. Eble „ŝi“ estas italino. La viro ne estas tiom bela. Sed la filino, oj, oj, oj! Tiu vizaĝo! Jam nun oni ekkonas, ke, kiam ŝi plenkreskos, ŝi estos tiom bela kiom ŝia patrino. Sendube ankaŭ ŝiaj mamoj same belas. Pri la kompetenta takso de tiaj estontaj inaj kromkreskaĵoj Mustaĉo tre spertulis.

Fine Mustaĉo decidis spite al mondo plena de ŝtelistoj laŭdezire surtabligi al siaj gastoj. Pendigante blankan tukon trans la brako, li ekpaŝis xlaŭ la longan verŝotablegon, levis falddbatalon, kaj iris ĉirkaŭ la vandan angulon, kiu malvidebligis la niĉon de lia normala starloko. Tiel li atingis la kvar gastojn.

„jour m'dame, 'jour m'sieur“, li afable komencis.

Helmuto troviĝas en stato de pani-

ko. Lia kunportita vortareto ne entenis la Francan vorton por „kokakolo“. Ankaŭ la legitaj kvin antikvetosaj romanoj de Jules Verne kompreneble neniam menciis tian trinkaĵon. Laŭŝajne liaj tutaj studoj vanis. Jen, post ses monatoj da intensega lernado li sidas en tiu ĉi aĉa vere ne tre impona vilaĝa drinkejo kaj ne kapablas mendi kvar kokakolojn. Strange, por la blato, kiu ĵus malrapide promenis laŭ la piedrandon de la najbara tablo li precize konis la vorton, aldone ĝian latinan nomon kaj eĉ unu slangajn. Nur pri „kokakolo“ estis kompleta vakuo.

Helmuto decidis improvizi. „Coca Cola“ oni supozeble ne diru France. Jen tro Angle. Sed eble nur „cola“ kiel en la Germana. Do necesiĝos nur iomete Francigi la vorton per tre forta finvokala akcento. Jen „kola“ aŭ simile. „Kvar“ estas „quatre“ kaj „bonvolu“ vere ne plu estos problemoj.

Mustaĉo komencis iomete senpacienca. Evidente tiuj ĉi ne identigeblaj gastoj nenature inklinis al silento.

„Vous désirez?“, li iom pli instigis demandis.

La cerbaj ĉeloj de Helmuto funkciis jam brilege. Le cerebre en labirinto el neŭronoj kaj sinapsoj elkalkuligis la laŭ li perfekta frazo Franca por „Kvar kokakoloj, mi petas“. Do restis nun nur la malpli scienca tasko adekvate eligi tiun kreaĵon de homa genio tra la buŝo evidente laŭpove perfekte laŭ akcento. La aŭdota realo impresu maksimume Francece, maksimume nature kaj estu maksimume mallongigita, alivorte, samstila kiel la slangaj „m'sieur“ kaj „jour“ de la verŝisto.

„Quatre colas, s'il vous plaît!“, li kuraĝe artikulaciis.

Iel li sentis sin ne tute certa pri tiu ĉi „kola“ kaj ĝuste pro tio eble li kuntiris la tutan frazon al unu kontinuaĵo. Ĉiokaze, li estis tre konvinkita, ke lia „katr-kola-sil-vu-ple“ sonis perfekte Francece.

„Nu, kial ne?“, pensis al si Mustaĉo kaj reforiris. Tiuj ĉi homoj estas tiom strangaj, ke povas temi evidente nur pri germanoj. Aliflanke la patro tre bone kaj senbalbute efektivigis sian mendon en la Franca. Preskaŭ senakcente kaj vere tre flue.

Helga ege fieris pri la tute aŭtente sonanta debuta Franca frazo de sia edzo. Patriko eĉ pli fieris, ĉar li do plene pravis. Paĉjo kapablis je ĉio ajn. Suzana, iel perceptante sian pripaĉjan malvenkon, venĝe batis krucon de sia pli juna frato per piedo sub la tablo.

Mustaĉo komencis pretigi la mendon. Vere strangan tiuj germanoj. Oni tute ne miru, ke ili malsukcesis gajni du militojn. Sed aliflanke BMW estas

bona aŭto. Ankaŭ la elektraĵraziloj de Braun estas sufiĉe bonaj.

La kvaro atendigis siajn kokakolojn. Helmuto jam riproĉis al si, ke li ne estis aldoninta la epiteton „grandaj”. Oni vere bezonis grandajn kokakolojn, kaj tiujn tute urĝe. Sed kiel scii, ĉu konvenu „le cola” aŭ „la cola”? Malfeliĉe por franclingve „grandigi” kokakolojn la scio pri tiaj bagatelaj detaloj nepre necesas.

Intertempe pasis jam tri aŭ kvar minutoj.

„Kial li ne alportas la kokakolojn?” duonflustre demandis Helga.

Helmuto vere ne sciis la respondon al tiu ĉi tre justigebla demando. Eĉ pli strange. La verŝisto evidente okupiĝis pri io tute alia. Io laŭte siblis, kiel likanta vapora kaldrono de malnova centra hejtilo. Aldone tintis io. Fakte la sonoj de la niĉe nevidebla verŝotablo iĝis pli kaj pli laŭtaj. Oni ricevis jam la impreson esti en stacidomo, kie cirkulas pluraj antikvaj vaporlokomotivoj. Nun komenciĝis eĉ iu stertoreca gargarado.

„Ĉu li eble miskomprenis ion?”, pli al si, ol al Helga, demandis Helmuto.

„Vere strange”, diris Patriko.

„Espereble li baldaŭ revenos. Estas tiom varmege, ke mi ne plu eltenas”, aldonis Suzana, kiu soifegis.

„Nu iam li espereble revenos”, stoke aldonis Helga.

Inter la kvar reregis silento.

La gargaraj sonoj atingis specon de klimakso. Evidente bolis io. Tiam sekvis kelkaj pliaj tintoj kaj kvar metalaj sonoronoj, kiel tiuj de ĵetitaj kafkuleretoj. Iom post iom la kvar supozis, ke la mendo estas iel misestiginta. Helmuto iĝis pli kaj pli nerveca. Nur li sciis pri la sekreto de la elpensita vorto „cola”. Helmuto konsciis, ke, se vere estiĝos fiasko, Helga priridos lin la tutajn feriojn.

De la ne plene senorda kakofonio oni ekkonis, ke nun la verŝisto surpletigis ion. Laŭŝajne tasojn. La streĉo ne plu longe daŭris. Li jam venis.

„Quatre ch'colats!”, anoncis Mustaĉo, cerbumante pri la evidenta frenezo de germanoj kaj okulangule mense notante kelkajn detalojn pri la trablaze videblaj mampintoj de Helga.

Post sia solena tre profesia deklaro li surtabligis la „katr ŝ-kola”. Jen kvar tasoj da varmega trinkĉokolado! Tiuj trinkĉokoladoj, kiujn Mustaĉo estis alportinta, tiom varmegis, ke ili sukcesis videble vapori eĉ somermenze je aera temperaturo de 26 gradoj. Mustaĉo reforiris, esperante pri la honesteco de ĉiuj frenezuloj, kaj pli specife, pri la pagemo de tordmensaj germanoj nepre volantaj trinki bolantan

trinkĉokoladon meze de ĝiskreve varmega somera posttagmezo.


Senforte la kvar trinketis siajn ĉokoladojn, laŭpove bruligante nek lipon nek langon. Poste, senkomente, Helmuto pagis Mustaĉon, ne volante iel ajn montri, ke la menditaj ĉokoladoj estis malbonvenaj. Pri pliaj klopodoj komunikiĝi kun Mustaĉo li rezignis.

Ankaŭ ĉiuj postaj ege spertaj interpretadoj kaj tradukadoj de Helmuto en hoteloj, butikoj, pulfoiroj, restoracioj kaj metrostacioj tute ne plu sufiĉis por kompensi tiun unuan lingvan mortbaton. Eĉ la tujtradukado de la Francaj novaĵoj el la hotela televido, se ne menciis lian interparolon kun butikega detektivo, kiu pro miskompreno pri ne antaŭ-enire xsiglofermita mansako nepre volis aresti lian

edzinon, ne plu savis lin de la stigmato de iu, eĉ ne kapablanta post sesmonata lernado pri la mendo de kvar kokakoloj. Tial por Helmuto komenciĝis hejme neevitebla nova nelerna periodo.

Kara leganto, eble unu lasta afero restas klariginda. La franca slangaĵo por kokakolo estas, alie ol en la Germana, ne „kola”, sed „koka”. Do estis nur unusola misa litero, kiu tiom fie plonĝigis Helmuton en novan kruelan fatalon. Aliflanke Helga kaj Helmuto tre feliĉe, tamen ne tute senkverele, plu kunvivadis kaj ĉe la lasta nombro estis jam tri infanoj. Aldone la komisiita venenisto tre sukcese forpelis la blatojn de Mustaĉo, sed tio ne multe helpis, ĉar la aŭtoritatoj post unu jaro decidis malkonstrui la tutan domvicon por plilarĝigi la straton. ■

Ĉu vi tajpas?



Se jes, jen la rearangô de (ekzemple) via Usona glavaro por Esperanto en la nova 2.1a versio de ...

Poste, komflorte trovu ĉiujn viajn misdajpojn kaj ortographiajn eraronj per la aŭtomata literumilo en ...

Ĉapelilo 2.1
Amaso da tiparoj
Literumilo
Dividilo
Por Windows kaj Mac
(kun SoftWindows95.4)
125 eŭroj
+ aŭfranko

Ne skribaĉu! Skribu elegante per ...

Distribuas: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrikele 140, B-2000 Antwerpen. Tel: +32 3 234 34 00
Fakso: +32 3 233 54 33 - Reto: butiko@fel.agoronet.be - TTT: http://esperanto.agoronet.be

Faligas la fundamentojn de esperantismo

La pli ol tricentpaĝa poŝformata libro *Esperanto sen mitoj* de Ziko Marcus Sikosek, konata aktivulo kaj eks-estrarano de Germana Esperanto-Junularo, fine prezentiĝas libroforme. Jam antaŭe lia teksto aperis sur la lumdisko *EspeROM*, iom pli malfrue en TTT-ejo en Interreto, kaj broŝurforme sub la nomo *Proponaro pri Esperanto-informado*. Supozeble, unue nun, ĝi fakte atingos kaj neeviteble vangofrapos la publikon celatan, nome la kredemajn verdstelajn tradiciistojn de la Esperanto-movado kaj grandan parton de la ne malpli naive tradiciemaj movadestroj.


Ido de Raŭmo

Ĝisdate nur malplimulto konsciiis pri tiu ĉi interesega teksto, kies naskiĝo tre logike sekvas el la iugrada populariĝo de la raŭmismo pritrakto de Esperanto. Temas pri speco de sufiĉe laŭta kaj ege intensa funebra sonorado direktata al la ne tute jam plene mortaj ideoj de la finvenkistoj.

La aŭtoro kvazaŭ jam lastpreparas fosas ĉiujn necesajn tombotruojn por ties idearo kaj glatigas la vojon por ĝia lasta solena procesia vicmarŝado. Do tiu ĉi teksto faligas la fundamentojn de esperantismo.

Sikosek, pledante anstataŭigi la kutiman primitivan propagandon per inteligenta kaj honesta informado, tre juste, tre detale, tre racie kaj tre bone dokumentite senmitigas por ni la tutan terenon. Kia senfine skuega ŝoko embuskos kontraŭ iu kaj iu Kavaliro de la Mil Verdaj Steloj inter la kovriloj de tiu ĉi libro, pri tio jam averte malsekretas ĝia subtitolo „Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado“. Kaj verdire, tiu averto estas medicina necesajo. Nur danke al ĝi supozeble saviĝos iu kaj iu maljuna fervorulo de tuja mortbata apopleksio, ĉar, enlibre pruvate, tiuj ĉi subtitole menciitaj mensogoj kaj memtrompoj abundas per nombro fakte eklipsota nur de la enlistigita nombro de la duonveraĵoj regule disvastigitaj de la movado. Ĝuste tiuj ĉi sufiĉe ofte fraplinie ornamas la unuajn paĝojn de niaj oficialaj movadaj organoj.

La libro laŭrubrike tralumigas ĉiujn fabelojn kaj legendojn el la tradicia Esperanto-propagando. Jen la traktataj kampoj:



- * Informado sen mitoj,
- * Komunumo sen mitoj,
- * Subtenantoj sen mitoj,
- * Lingvo sen mitoj,
- * Planlingvoj sen mitoj,
- * Zamenhof sen mitoj,
- * Manifestoj sen mitoj.

Do vere neniu el niaj sanktaĵoj restas netuŝita. Efektive, la aŭtoro tre klarvide malkaŝas la propagandan sistemon, sur kiu esperantismo ĝis nun baziĝas. Jen kolekto de misinformoj, kiun la esperantistoj kaj esperantestroj ĉiam denove revigligas, kaj kiun ili pli aŭ malpli konscie etendis dum pli ol jarcento ĝis en la hodiaŭa epoko. Eĉ pli ĝene. Ni viktimitas nin mem per nia propra propagando tiugrade, ke intertempe ni apenaŭ plu povas distingi miraĵojn de miraĝo.

Bone dokumentita

Nedisputeble, plej konsole kaj re-trankvilige por ĉiuj legantoj estus, se la aŭtoro malpravus. Tiam oni rajtus indignege krei „Mensogulo!“, „Fiulo!“, „Aĉa armeano de la Fortoj de Mal-lumo!“. Des pli bedaŭrinde estos por multaj, ke ĉiuj aŭtoraj klarigoj kaj rivel-aĵoj estas tiom bone dokumentitaj, ke restos por la leganto nur la eblo hontege krieti „Perfidulo!“.

Memkompreneble, la aŭtoro celas nek perfidi nek provoki kaj fakte temas pri preskaŭ scienca faklibro en tre sobra afereca kaj preskaŭ senriproĉa lingvaĵo. Tamen, konsiderante la gradon de emociiĝo de averaĝa esperantisto pri sia lingvo kaj pri ties sanktaj insignoj, oni povos atendi inundon de protestoj kaj uraganon de vekrioj.

Punkton post punkto la aŭtoro pruvigas al ni, ke tio, kion ni publike disvast-

igas, estas aŭ mensogo, aŭ tro naive kredata mito, aŭ konscie lanĉita duon-veraĵo, aŭ, plejbonokaze, simple stulta kaj rekte taŭga por forpeli novajn interesiĝantojn. Li montras, ke multo el tio, kion ni asertas, rekte misefike nutras la antaŭjuĝojn de la ne-esperantistoj, kiujn ni vane strebas esperantistigi. El niaj ĝisnunaj agadoj malmultaj laŭdindaĵoj postrestas. Ĉe tio klariĝas, ke la aŭtoro mem dum sia junaĝo naive kredis niajn legendojn, sed jarojn pli malfrue komencis dubi. Nur post detala laŭebla esplorado de la aŭtentaj fontoj li sukcesis travidi la multajn mistifikojn, kiuj kamufle ĉirkaŭvualas nian realan movadan historion.

Tiel li sciigis al ni, ke niaj fruaj estroj funebre incensadis „pionirojn de Esperanto“ kiuj fakte estis rezignintaj pri Esperanto aŭ delonge okupiĝis pri alia planlingvo. Jardekojn poste jen klariĝas, ke okaze de fiera prezento ĉe specifa UK oni fanfaronis pri la tiama tre fama loka Volapuka klubo, kiu laŭlegende tutmembre rezignis pri Volapuko avantaĝe al la nova perfekta Esperanto.

En vero la klubo agis iomete alie. Unue, ne temis pri ĉiuj membroj. Due, la klubo aliĝis, nur kondiĉe ke oni reformu Esperanton, kion oni laŭŝajne promesetis. Trie, la freŝaj esperantistiĝintoj tre baldaŭ forlasis Esperanton por okupiĝi pri la planlingvo Neŭtralo, kaj post tio entuziasmiĝis pri Ido. La aŭtoro rakontas al ni, kiel ni ofte citas famulojn – ekzemple, Ejnŝtejnon – laŭaserte apogantaj nin, kiuj fakte neniam ajn apogis nin aŭ eĉ rekte kontraŭis Esperanton. Simile li atentigas pri tio, ke Unesko ja agnoskas, ke la umado pri Esperanto estas en akordo kun ĝiaj celoj kaj pro tio akceptas UEA-on, sed, ke tiu ĉi agnosko neniel rilatas al la propagandado pri Esperanto kiel „ĉies dua lingvo“ aŭ pri la praela „Fina Venko“. Eĉ nia renoma membreco en PEN-klubo ne eltenas la plenan sunlumon.

Eĉ sanktaĵoj

Aldone li pelas felanden la mitojn pri la nur 16 reguloj kaj pri la prope-deŭtika valoro de Esperanto. Samdirekte malaperas ĝiaj lingvaj facileco, supereco kaj perfekteco kaj ĝia mirakla propaĵo aŭtomate pacistigi ĉiujn adeptojn. Do ĉio, kio estas al kelkaj kara, finiĝas en la rubujo – al kiu ĝi nedisputeble apartenas.

Eĉ la persono Zamenhofo – nia Majstro – ne restas senmakula. Ekzemple, liaj geniecokaj poligloteco estas iomete reduktataj al realisma nivelo. Same videbliĝas kelkaj ne tre

honestaj propagandaj trukoj okazigitaj de li.

Ankaŭ la propagandcela kaŝado de lia judeco kaj la falsema sciigo pri lia onidira poleco temiĝas. Plu oni lernas, ke iam vicprezidanto de UEA estis membro de la tiama Hitlera partio, alivorte de tiu partio, kiu murdigis Zamenhojn.

Sed la libro ne nur pilorias kaj riveblas. Ĝi ankaŭ konsilas, kion oni inkluzivu en informadon pri Esperanto kaj kion ne. Same ĝi instruas, kiujn reklamajn formulojn oni nepre evitu kaj kiuj estas konvenaj por publika varbado. Multaj ĉi-temaj personaj spertoj de la aŭtoro enfluas en la tekston kaj oni ekkonas, ke tie ĉi skribas internulo kun aŭtenta varbada sperto.

Laŭ la opinio de la recenzanto, tiu ĉi libro devus esti laŭdeva legaĵo por ĉiu aktivulo.

Seniluziiga

Des pli seniluziige sonas la postparolo de la libro. Jen la aŭtoro retorike demandas: „Ĉu la mitoj, memtrompoj kaj mensogoj estas la necesa amalĝamo [n.d.l.r. alivorte: mortera miksaĵo] por la Esperanto-komunumo? Ne forgesu, ke amalĝamo enhavas la venenan hidrargon, kiu ruinigas la nervan sistemon...”

Antaŭe, en la aŭtoro komento pri Manifesto de Prago, oni legas: „Tiu ĉi dokumento lanĉita dum la Universala Kongreso 1996 en Prago estas forta kialo malesperi pri la t.n. Esperantomovado.” Tiun ĉi opinion dividas ankaŭ la recenzanto, kiu nun danke al tiu ĉi libro, interalie, sciiĝis pri sia propra trukiteco rilate kelkajn popularajn misasertojn ĉie cirkulantajn en Esperantujo.

Ĉiuokaze, kiu ne timas herezaĵojn kaj kies mensa fortiko sufiĉas por elteni skandalojn kaj malagrablajn riveladojn, jen por tiu la konvena legaĵo. Sed ĝuste tiaj personoj supozeble konsistigas jam nian dubeman, nekredeman, esploreman, racieman frakcion. Jen tiu, kiu al la ekstera mondo jam tre zorgeme kaj pripense prezentas la planlingvon Esperanto kaj ĉe tio por maksimume sukcesi nur minimume videbligas la akompanantan adeptaron.

Alivorte timanto de tio, ke tiu, kiu aĉetos nian Esperanto-brasikon sur la planlingva foiro, endanĝeriĝos nevole kunaĉeti skvamojn de malbongustaj brasikmuŝetoj plus iu kaj iu neglutebla limako. Kaj verdire estas tiel, ke nur unu misianta strangulo, disvastigante sian kutiman primitivan E-propagandon okaze de gazetara konferenco, povos fiasiki la plurjaran seriozan informadan laboron de deko da sanmensaj esperantistoj.

Niaj agresemaĵoj kontraŭ-anglaj antaŭenistoj, niaj fervoraj finvenkemaj fundamentistoj, niaj pamfletistoj, predikistoj, kvazaŭ-religiaj pacistoj, misiemaĵoj mondsavuloj, dediĉitaj disĉiploj de iu nebula „interna ideo” laŭ Sankta Ludoviko – alivorte ĉiuj niaj de persekuta manio suferantaj esperantismaj ekstremistoj, do tiuj ĉi plej urĝe devus studi tiun analizon por eĉ „ĝisoste” kaj cerblave reedukiĝi. Tamen ĝuste ili supozeble evitos tiun ĉi tre legindan libron, kiel la diablo la sanktan akvon.

PEJNO Simono

Ziko Marcus Sikosek: *Esperanto sen mitoj* Eld. Flandra Esperanto-Ligo, 1999. Prezo ĉe FEL: 22,50 eŭroj + afranko.

Bona furaĝo

Kiel klarigas William Auld en sia *Antaŭparolo*, la celo de ĉi tiu eldono estas „savi” libroforme iujn tekstojn, kiuj aperis nur en revuoj, do ne estus facile retroveblaj. La enhavo estas teme tre diversa, dividita en kvar sekciojn: *Eseoj*, *Rakontoj*, *Tradukoj*, kaj *Libro-kulturo*.

La 17 eroj en la sekcio *Eseoj* kovras diversajn temojn, sed precipe literaturon kaj tradukadon. La unua ero – „Paco inter homoj – ĉu eblas?” – prezentas ankaŭ filozofian tezon, sed ĝi ŝajnas al mi iom banala, malgraŭ la belaj literaturaj citaĵoj, kaj mi trovis pli interesaj la sekvajn erojn pri fantascienco, pri prozaj tradukoj en Esperanto, pri retrovitaj poemoj de Braun, pri Hilda Dresen, ...

En pluraj lokoj la aŭtoro argumentas kontraŭ tiuj, kiuj tro malalte taksas la valoron de Esperanta literaturo, kaj li estas leginda pri tiu temo, ĉar li havas, krom multe da sperto kaj scio pri Esperanta literaturo, ankaŭ talenton kaj komprenon pri literaturo kaj la kapablon prezenti siajn ideojn en alloga maniero. La *Eseoj* kovras periodon de 1950 ĝis 1990, sed ili ne estas ordigitaj en evidenta maniero.

La *Rakontoj* konsistas el sep originalaj rakontoj, sur malpli ol dudek paĝoj; se mi ĝuste komprenis la „Antaŭparolon”, tio estas la tuta proza fikcio de William Auld. Kelkaj el la rakontoj ŝajnas kvazaŭ resumoj de pli longaj verkoj; eble la aŭtoro, ekhavinte interesan ideon, ne emis enŝovi la malesencajn detalojn, kiuj necesas por disvolvi plenan novelon el ĝia skizo. Tamen evidente tio estas multe pli bona ol la inversa kaj pli ofta situacio, en kiu diligenta aŭtoro ŝtopas centojn da paĝoj ne havante interesan ideon!

En la *Tradukoj* troviĝas 17 tradukoj el la angla kaj la skota. Neniun el la tekstoj mi jam konis per alia lingvo, kaj

verŝajne neniun leganto jam konos multajn el la tekstoj, ĉar temas ŝajne pri sensistema kolekto da tekstoj, kiuj diversemaniere plaĉis al la tradukinto. Ĉiuj tradukoj estas prozaj, sed ne ĉiuj estas fikciaj: enestas ankaŭ kelkaj eseoj, interalie pri historio kaj metriko.

La lasta sekcio, *Libro-kulturo*, konsistas el 25 eroj, kiuj plejparte estas recenzoj aŭ eseoj pri apartaj verkoj. Evidente ne temas pri rutinaj, informaj recenzoj kiel ĉi tiu, sed pri artikoloj kun literaturesplora valoro. Ekzemple, unu el la plej longaj pritraktas du Esperantaj tradukojn de la ŝekspira *Hamleto*.

UEA (kiu eldonas ĝin) reklamis ĉi tiun libron kiel la „rikolton de 50 jaroj”. Tamen ĝia titolo pli ĝuste indikas, ke temas pri tio, kio restis post la rikolto! Do oni ne kredu, ke ĉi tiu eldono iel anstataŭas aŭ resumas la kvindekajn da libroj, kiujn produktis William Auld en tiom da jaroj. Rikoltitaj el la sama kampo kiel la *Eseoj* kaj *Libro-kulturo* estas ekzemple *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* (1979), *Vereco, distro, stilo* (1981) kaj *Pri lingvo kaj aliaj artoj* (1978); sed ankaŭ ĉi tiuj pajleroj kaj stoploj estas bona furaĝo.

Edmund GRIMLEY EVANS

William Auld: *Pajleroj kaj stoploj; Elektitaj prozaĵoj*. Eld. UEA, Rotterdam, 1997. 342 p. Prezo ĉe FEL: 19,05 eŭroj + afranko.

Latvo en Britio

Jen la plej bona membiografio, kiun mi ĝis nun legis! Bruno Najbaro detale kaj atentokapte priskribas sian vivon: Latva kamparana knabo iĝas soldato de la germana armeo en la dua mondmilito (1939 ĝis 1945), fuĝas militfine okcidenten por ne kontaktiĝi kun la sovetia armeo, iĝas laboristo en Britio, kie li trovas novan hejmlandon. Li vivas nun kiel pensiulo kaj delegito de Universala Esperanto-Asocio en Keighley, Britio.

Klare oni vidas la evoluon de homo: de kamparano al profesia teksaĵisto, sed ankaŭ al konvinkita esperantisto; jam frue pensinte pri la neceso de „superlingvo” (kiel li ĝin nomas), li dufoje aŭdas pri la reala ekzisto de tia lingvo, kiun li fine lernas.

La teksto ampleksas nur 116 paĝojn, sed pro la etaj preslitteroj (la diakritaj signoj ne ĉiam estas bone rekoneblaj) oni havas multon por legi. Kelkaj mapoj kaj desegnaĵoj estas plaĉe aranĝitaj.

Walter KLAG

Bruno Najbaro: *Rakonto de kampara bubo* Elonis: Latvia Esperanto-Asocio, 1994. 116 paĝoj kudre binditaj. Prezo ĉe FEL: 5,75 eŭroj + afranko.

Poemoj

de PENG Zhengming

1

Vi kontaktas min kvazaŭ naive
Vi priatentas min pli ol mature
Mi simple ne kredas
Ke en la urba brueco
Iu havas tian intencon:
Legi mian koron
Kiun la vulgara heĝo ŝlosas

2

Mia koro
Rondumas ronde ĉirkaŭ vi
tamen mankas al ĝi taŭga radiuso
Vi radias malkaŝajn liniojn
Kiu kisas
Mian senĉentran koron

3

Vi estas mia blua sopiro
Mi estas via ruĝa espero
Miksate kun la graza vivo
Ĉu fono
De la futuro
Ombros aŭ brilos?

4

Vi estas modelo de mia sento
Ankaŭ reĝisoro de mia vivo
Kiam mia prezento ekas
Vi estas la sol-spektanto

Ne permesas alies aplaŭdon eniri
Mi nur rarigas vian ĝuon

Eĉ se akciigi la scenaron
Ĉiu akto
Meritas klasikan

5

Mia poemo
Sen ambaŭ titolo kaj ĉessigno
mia koro
Sen ambaŭ prezindiko kaj etikedo

Tamen mia sento valoras
- la valuto estas sen nacieco
Bedaŭrinde
Aŭ en la mondo ŝanĝi
Aŭ en la paradizo elĝiri
Tiam
Perdiĝos sigelilo
Kiu gravuritas el niaj koroj

6

Mi ĉesigas vian tempon pene
Vi fiŝhokas mian solecon vere
Ĉiuj temperoj
Nian flustron aŭskultas atente
Ĉiuj kalendareroj
Trafoliumiĝas pornie
Sub la luno
Mi ĝuas la duiĝon de niaj ombroj

7

Kune ni ĉion forgesas
Dise ni ilin rememoras
Ĉiam la afero samas
sed ne ripeteblas
Ĝi ne finas

Eĉ ne ekas
Simpla sed ne teda
Komplika kaj konebla
Hieraŭ pasis
Hodiaŭ vi atentigas min:
Enmemoru morgaŭon!

8

Tia ekstazo ne eltroveblas
Eĉ
Tiu seriozo ne reaĉeteblas
Ja perfekto ne ekzistas
Do persisto nur estas
la rajto kiun vi priludas
kiu al vi apartenas
Intersopiro ne decas
Interamiĝo tre rektas
Atentu
Ke vi vin forvendas!

9

Se amo turmentadas nin
Kial ne malbeni ĝin?
Via amo ja estas soifa
Tamen mi ne estas fonta
Kruele estas ĝui vian solecon
Rabece estas peli vian izolecon

Falsan veron redoni al vi
La amo portempe eternu!

10

Pejzaĝo eldirita ne belas
Procezo travidebla ne bonas
Se vi
Estus en mia imago
Mia koro
Veras kiel tero!

Limerikoj

Ferias sinjor' en Las Vegas.
Gazeton MONATO li legas.
Li ege sin ĝenas:
neniom komprenas,
ĉar li Esperanton ne regas.

Kongres-vizitant' el Berlino
seksumis kun publikulino.
Kondomo diskrevis
kaj tuj li ricevis
aidoson pro malĉasta sino.

Sentema junul' el Assisi
kuraĝis knabinon ekkisi.
Post nokto kun am'
li pentis ĝin jam:
dolore nur povis li pisi.

Viajn kontribuojn por la rubriko
„ŝerco & satiro” sendu al:

Stefan Maul
Pferseerstr. 15
D-86150 Augsburg
Germanio

Retpoŝto: maul@newsfactory.net

Dum horoj en urbo Milano
balotvarbis registarano.
Do, kvazaŭ torpede
li tretis piede ...
Vezik' povas esti tirano.

Prelegis virin' en Odeso
ĉe esperantista kongreso.
Dum ŝiaj eldiroj
ekdormis la viroj.
Ho ve, Esperanto-progreso!

Ĉarmeta knabin' en Vieno
diboĉis kun urb-indiĝeno.
Pro troo da vino
ekvomis la ino,
sed ĝuste dum hejmenpromeno.

Lernant' plendis en Germanio
pri nova la ortografio.
La homo kuraĝa
ja taksis ĝin aĉa.
Demandis li sin nur: pro kio?

Koincidoj

Oni povas diri, ke la murdoj de
Abraham Lincoln kaj John Kennedy

estas paralelaj. Rigardu tiujn ĉi koincidojn: Sekretario avertis Lincoln ne viziti la teatron, kie li estis murdita. La nomo de la sekretario estis Kennedy. Sekretario, kiu nomiĝis Lincoln, avertis Kennedy kontraŭ la vizito al Dallas, kie oni murdis lin. Lincoln gajnis la baloton en 1860 kaj Kennedy en 1960. Andrew Johnson (naskita en 1808), vicprezidento, sekvis Lincoln; Lyndon Johnson (naskita en 1908) sekvis Kennedy. Ambaŭ murdintoj estis el la sudo de la lando. Wilkes Booth, kiu murdis Lincoln, eskapis el la teatro al tenejo. Oswald (la supozata murdinto de Kennedy) eskapis el tenejo al teatro. Ambaŭ prezidentoj estis pafitaj de malantaŭ la kapo kaj antaŭ sia edzino.
Vilĉjo

Ĉinaj ŝercoj

La rekrutoj unuan fojon estas trejnataj. Oficiro senĉese krias komandojn: „Maldekstren! Dekstren! Malantaŭen! Antaŭen! Dekstren!” Unu rekruto foriras el la vico kaj la oficiro demandas: „Kien vi iras?” „Mi paŭzos kaj revenos nur kiam vi decidis, al kiu direkto ni turnu nin.”

Policano, dimanĉe, por amuzo ĉasas bestojn. Jen li vidas leporon kurantan el herbejo, kaj la policano laŭ sia kutimo krias, levante la pafilon: „Haltu, aŭ mi pafos!”

Patrino venas hejmen, kaj tuj eta Hong demandas ŝin: „Panjo, ĉu vi scias, kiom da dentopasto estas en unu tubo?” „Mi ne scias, infano mia.” „Sed mi scias, ĉar mi elprenis; ĝi atingas de la sofo ĝis la pordo!”


Mia 5jara filo spektas en televido usonan desegnofilmon pri musido kaj anaso. De tempo al tempo li rideskplodas, pri kio mi tre miras, ĉar li ne scias la anglan.

„Ĉu vi komprenas, kion ili interparolas?” mi do demandas.

„Sed panjo,” li replikas, „kiel mi kapablas kompreni la lingvon de muso kaj anaso!”

Kun mia 9jara filo ĉe bankaŭtomato mi prenas monon, sed avertas lin, ke pro sekureco neniu devas vidi nin. Kiam la aparato eligas 10 tute novajn 10juanajn monbiletojn, mia filo kun grandaj okuloj proponas: „Ankoraŭfoje, panjo! Neniu vidis nin!”

Wu Suzhen



anoncetoj

NOVA REVUO Esperantologio / Esperanto Studies estas planata. Altkvalitaj manuskriptoj pri ĉiuj aspektoj de Esperanto estas serĉataj por ĝia unua kajero, kiu espereble aperos en 1999. Por pliaj informoj rigardu www.math.uu.se/esperanto aŭ skribu al Christer Kiselman <kiselman@math.uu.se> aŭ poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio.

Omaĝe de 100jara jubileo de plejaĝa – enmode vivanta olimpiko Leon Štukelj, slovena poŝto eldonis serion de 3poŝtmarkoj. Riceveblaj kontraŭ 5 respondkuponoj. Por la registrita resendo 6 irk. Mendu ĉe: Ferrovijista Esperanto-Societo, pf 825-SI-2001 MARIBOR, Slovenio.

Esperantujo-Tendumejo. La loko kie oni kuraĝigas la komencantojn kaj forpelas la krokodilojn. Tiele ĉe: Hans Kästli, Esperanto-Tendumejo, Brendenstrasse 11, CH-9424 Rheineck. Ebleco lu-preni ĉambron, loĝvagonon, kabanon. Por unuopuloj ebleco perlabori sian restadon.

Memorigaĵoj de sinmortiginto – Fama portugala verkisto, Camilo Castelo Branco, el la astrala mondo diktis libron pri sia vivo, kiel sinmortiginto, per la mediumo s-ino Yvonne do Amaral Pereira, kiel avertito al la legontoj. Ĝin esperantigis s-ano Affonso Borges Gallego Soares. La libro havas 646 paĝojn, belan kovrilon kaj bonan paperon. Prezo: 40 USD aŭ egalvaloro, plus afranko 10 %. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe la eldoninto: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal, 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

FERIEJO – Esperanto-kooperativo disponigas spacon por trankvila restado apud rivero en la centro de Portugalio. Petu informojn al Kooperativo Saluton, Rua Mira-douro, 12, 2735 Cacém – Portugalio.

Java / Visual Basic: Ĉu vi scipovas programi per unu/ambaŭ de ĉi tiuj komputilaj lingvoj? Mi faras esploradon pri kompreno de komputilaj programoj, kaj serĉas volontulojn. Se vi pretas partopreni per duonhora kvizo, b.v. sendi retmesaĝon al mi: wgtwalker@jee.org.

Irana esperantisto (27 j.) deziras korespondi kun Usona fraŭlino (17-26 j.) edziĝcele. Akbar Fekri, 209/1, Bonbaste Vaziri. K:Sadat, Kh:Medi, Meydan Vahdat Eslami, IR-11958 Tehran, Irano.

Poŝtmarkoj – intersaĝo Francio/tuta mondo. Mi sendos 50/80 francajn uzitajn aŭ pli kontraŭ sama kvanto en via lando. Ebleco postaj interrilatoj. Fouconnier – FR-80330 Longueau.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en Interreto: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 EUR*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

*Por Eŭropa Unio + 21 % AVI.



Veraj travivaĵoj en la brazila ĝangalo.
Originala verko
196 paĝoj
Prezo: EURO 11,70

Interesaj ideoj de eminentuloj pri Esperanto.
250 paĝoj
Prezo: EURO 17,50




Mendojn:

Skribu / faksu: **Aŭstria Esperanto-Movado**, AT-1050 Wien, Margaretengürtel 100/11/2, Aŭstrio. (+43 - 1 - 548 61 44)

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo!

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Prezo 8,95 EUR (plus afranko). Se vi mendas 3 ekzemplerojn, vi ricevos kvaran senpage!

**Ĵus
aperis!**

Monato
SENDEPENDA

SUBTEKSTE

PAROLIGAJ KAJ PERFEKTIGAJ
EKZERCOJ

d-ro Paul Gubbins

Flandra Esperanto-Ligo

Antverpeno 1999

Prezo: 12 EUR